

Ŭ-4252/ 78 (1985)

1985 decembro

78a jaro



n-ro 960 (12)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



**Ĝenerala Konferenco
de Unesko
favore pri Esperanto**

Vi trovos

en ĉi tiu numero unu el la plej gravaj novaĵoj de post 1954. Krom tiu notenda evento, ni aperigas plurajn tekstojn pri informado, kio levas en la kapo de la redaktoro la temon "prokrastado". La karakteriza eco de novaĵo estas ĝia noveco. Diri, ke io grava okazis pasintmonate, estas kvarfoje pli interese, ol diri, ke ĝi okazis antaŭ kvar monatoj. Tamen, iuj personoj ankoraŭ ne konscias, ke ne taŭgas informi pri "novaĵo" du aŭ tri monatojn post la okazaĵo! Tiam la redaktoro ofte devas ĵeti la informon en la rubujon, kvankam prokrastado etendiĝas tra granda parto de la movado. La revuo *Esperanto* jam nun povas aperigi bone pretigitan novaĵon post proksimume tri ĝis kvin semajnoj. Cetere, ĝuu agrablajn jarfinajn festojn!

Enhavo

- 201 Centjara Jubileo: Sofio pli ol rekonfirmas Montevideon (Simo Milojević)
- 202 Unesko denove rezolucias favore al Esperanto (Tibor Sekelj)
- 203 Rezolucio de Unesko XI.4.4.218: Festado de la centjariĝo de Esperanto
- 205 Edukado: Diplomoj de AIS estos oficialaj en San-Marino; Faka agado: Nur por komputistoj? (Sibayama Zyun'iti); Informado: Alvokas grava internacia asocio por esplorado
- 206 Esperanton ombrele; Eldonado: Festlibra atuto por la internacilingva kulturo
- 208 Informado: *LPLP*: Pli da Esperanto, malpli da defcito; Telekomuniki movadajn informojn (Graham Leon-Smith)
- 209 Informado: Por informi trafe, iom da psikologio (Claude Piron)
- 211 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 71a Universala Kongreso)
- 213 Recenzoj: *Montara vilaĝo* de Ye Junjian (Reto Rossetti); *Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo* (Jouko Lindstedt)
- 214 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
- 215 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
- 217 Indekso pri la 78a jarkolekto de la revuo *Esperanto*
- 220 Oficiala informilo; Nekrologoj; Anoncetoj

La kovrilo

bildigas la Ĝeneralan Direktoron de Unesko, s-ron Amadou-Mahtar M'Bow (maldekstre) kaj la observanton de UEA, s-ron Tibor Sekelj, dum interparolo la 18an de oktobro, okaze de la 23a Ĝenerala Konferenco de Unesko en Sofio, ĉefurbo de Bulgario.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US \$ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio; ☎ (03) 770 64 86.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 42 37 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Sofio pli ol rekonfirmas Montevideon

La 8an de novembro 1985, la pleno de la 23a Ĝenerala Konferenco de Unesko, kiu okazis en la bulgara ĉefurbo Sofio de la 8a de oktobro ĝis la 12a de novembro, akceptis novan rezolucion favore al Esperanto kaj ĝia Centjara Jubileo. La tekston de la rezolucio kaj detalojn pri la laboro ligita kun tiu nova rekono al la Internacia Lingvo vi trovas sur la sekvaj paĝoj. Tie la reprezentanto de UEA en la Ĝenerala Konferenco, s-ro Tibor Sekelj, kvazaŭ taglibre kronikas siajn sofiajn kontaktojn, esperojn, timojn, korritmon kaj atingojn.

Kiam vi legos la raporton de s-ro Sekelj, vi ja konstatos – prave –, ke li restas unu el la plej bonaj advokatoj pri kiuj la movado disponis tra la lastaj jardekoj. Tamen, pro la ĝisnuna manko de ajnaj aludoj, ke tia rezolucio estas en preparo, samkiel pro la fakto, ke s-ro Sekelj koncentras sian atenton al la fina stadio de la koncernaj laboroj, oni povus veni al konkludo, ke la nova rekono al Esperanto venis facile kaj kvazaŭ hazarde. Kial do akceptiĝis la rezolucio?

Antaŭ ĉio, la glacio estis rompita jam en 1954 fare de prof. Ivo Lapenna, en Montevideo, kie la 8a sesio

signis la komencon de la fino de la publika ignorado de Esperanto, kaj ĝi plej rimarkinde stampis niajn eksterajn rilatojn tra la pasintaj tri jardekoj. Tial estas juste, ke la nova rezolucio en sia unua alineo amplekse referencas al sia antaŭulo el 1954 kaj forte rekonfirmas la tiamajn starpunktojn kaj kvalifikojn.

Sed, ne estis simple la jaroj, kies postmontevidea fluo portis al ni la novan rezolucion. Intertempe okazis esenca strategia ŝanĝo en la rilatoj inter Unesko kaj UEA kiel la ĉefa esperantista organizaĵo. Anstataŭ konfrontiĝi kun Unesko pro ĝia malatento al la monda lingvo-problemo, UEA tra la pasintaj dek jaroj penetris en tiun specialigitan organizaĵon de Unuiĝintaj Nacioj, kaj tie, interne de Unesko, kunlaborante kun ĝi, komencis atentigadi pri la lingvo-problemo. Ne nur temas pri tio, ke UEA fariĝis unu el la gvidaj neregistaraj organizaĵoj kunlaborantaj kun Unesko, sed ĝi dum ses jaroj (maksimuma mandato) prezidis la kunordigan forumon de tiuj organizaĵoj ĉe Unesko. Tial eblis, ke la ĝenerala direktoro de Unesko honori nian Kongreson en Rejkjaviko (1977) per sia inaŭgura parolado, kaj ke li tra la postaj jaroj montriĝu plurfoje preta akcepti UEA-delegaciojn kaj atenti multajn aliajn movadajn eventojn (Greklando, Japanio, San-Marino, Britio) per siaj mesaĝoj. Ni facile povas aserti, ke la nuna ĝenerala direktoro de Unesko, s-ro Amadou Mahtar M'Bow, pionire kaj kuraĝe komencis atenti Esperanton, kion liaj antaŭuloj ne degnis aŭ ne volis fari spite la rekomendon el Montevideo. Tiel ankaŭ Esperanto fariĝas unu el la pruvoj, ke s-ro M'Bow estas alia ol la bildo, kiun pri li klopodas fabriki parto de liaj potencaj imperiemaj malamikoj.

Eblus serĉi – kaj facile trovi – amason da aliaj movadaj evoluoj, kiuj ebligis la akcepton de la nova rezolucio. S-ro Sekelj en sia raporto mencias la laborojn en pluraj landoj. Ni aldonu, ke ĉi-rilate grave pezis ankaŭ niaj decidoj kongresi en novaj mondpartoj, kiel en Brazilo (1981), Ĉinio (1986), Abiĝano (1990) ktp. Vi ja rimarkos, ke la delegacioj de Ĉinio kaj Ebura Bordo subtenis nin en Sofio (vd. la raporton de Sekelj). Nun fariĝas ankaŭ klare, kial UEA tra la pasinta jardeko elspezis tiom da mono por eldoni la diversajn nacilingvajn dokumentojn pri Esperanto kaj la lingvo-problemo, kial ni formis laborgrupon ĉe Unesko en Parizo, kial ni funkciigis la Novjorkan Oficejon...

Kiel interpreti la novan rezolucion de Unesko? La unuan, montevidan, alineon ni jam traktis, kaj ĝi esence ne estas novaĵo, se ĝi ne estus bazo por fari novajn rekonojn al la Internacia Lingvo: transiro de



Tibor Sekelj, observanto de Universala Esperanto-Asocio, dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko.

de la Ĝenerala Konferenco de Unesko akceptis la intertempe movade faman Rezolucion IV.1.4.422. Kvankam Unesko neniam multe faris sekve de tiu rezolucio, por la Esperanto-movado ĝi restis gravega historia dokumento, per kiu ni persiste svingis tra la pasintaj tridek unu jaroj, eĉ kiam la aliaj ne vere volis aŭskulti nin. Tiu montevidea rezolucio plurrilate

regiona (eŭropa) kaj beletra lingvo al tutmondiĝo kaj penetro en diversajn vivosferojn (alineo 2); rekono de la potencialoj de Esperanto kaj transiro de la pasinteco al la estonteco (alineo 3); rekta rekono al UEA kaj ĝia unika komunika reto pro la kunlaboro kun Unesko (alineo 4). Ankaŭ la lastaj, numeritaj, punktoj estas klare kaj detaleme formulitaj: gratulo pro la Jubileo (1), peto al la ĝenerala direktoro daŭre sekvi la evoluon (2); rekta invito al la ŝtatoj-membroj marki la Jubileon kaj instigi lernejan kaj universitan studadon de la lingvo-problemo kaj Esperanto (3), rekomendo al la nereĝistaraj organizaĵoj fari simile kiel la ŝtatoj-membroj kaj kvazaŭ sekvi la ekzemplon de la kunlaboro inter Unesko kaj UEA.

Ankaŭ Sekelj fine de sia raporto levas la demandon pri la signifo de la nova rezolucio. Li pravas kiam

li diras, ke ĝi "povas signifi multon aŭ nenion, kaj tio dependas de nia plua agado." Krome, ni eble nur nun komprenas, kia estis la vera signifo de Montevideo antaŭ 31 jaroj, kaj – sekve – post jardeko aŭ du, ni plene komprenos la signifon de Sofio 1985.

Unesko onidire ne plu restas tio, kio ĝi iam estis. Feliĉe! Ankaŭ la mondo ne devus resti tio, kio ĝi nun estas, i.a. sur la kampo de la komunikado kaj lingva egalrajteco. Se Usono forlasis Uneskon antaŭ unu jaro, se Britio vasale sekvis antaŭ kelkaj semajnoj, tio grave malkontribuas al la kaso de Unesko, sed ĝi devus aliflanke kontribui al la prestiĝo de Unesko, ĉar ĉiam estas virto rifuzi danci laŭ la trudita muziko. Unesko estas la ĝusta amiko de la Internacia Lingvo. Ni bezonas ĝian subtenon, kaj Unesko meritas nian apogon.

Simo Milojević

Unesko denove rezolucias favore al Esperanto

La 1-an de novembro ĉi-jare, la Kvara Komisiono de la 23a Ĝenerala Konferenco de Unesko, kunsidanta en Sofio, voĉdonis kaj ĉiuvoĉe aprobis la rezoluciproponon 23 C/DR.218, kiu koncernas la rekono al Esperanto kaj gratulon pro ĝia centjariĝo, kun pluraj rekomendoj.

Jen la simpla kaj klara fakto. Tamen, ĝis ni atingis tion, devis plenumiĝi sinsekvo de okazaĵoj, kiuj eble interesas la esperantistojn.

Kvankam la ideo pri nova elpaŝo antaŭ Unesko jam delonge ŝvebis en la aero, nur dum la Universala Kongreso en Aŭgsburgo la Komisiono pri Eksteraj Rilatoj de UEA formulis rezolucion (ĉefa redaktanto d-ro H. Tonkin) proponotan al Unesko. UEA nomis min kaj sian estraranon Petâr Todorov reprezentantoj de UEA dum la Konferenco, de la 8a de oktobro ĝis la 12a de novembro en Sofio. D-rino Barbara Despiney, estrarano pri eksteraj rilatoj, informis min pri pluraj

landaj asocioj, kiuj jam kontaktis siajn landajn Unesko-komisionojn, sed sen ia konkreta rezulto.

Kiel akiri proponanton?

La plej granda problemo estis akiri iun ŝtatan Unesko-komisionon, kiu pretas prezenti la proponon, je tia malfrua dato – estis meze de aŭgusto kiam mi atingis mian hejmon post la UK. Do, mi kontaktis telefone la jugoslavan komisionon, kaj ĝia sekretario informis min: "Jes, ni ricevis proponon de Jugoslavia Esperanto-Ligo pri la envicigo de la centjariĝo de Esperanto en la liston de jubileoj, kaj tiun proponon ni prezentis al Unesko jam en marto. Do, via veno al Beogrado estas nenecesa." Mi tamen vizitis lin – s-ron Perković – kiu, vidinte la rezoluciproponon kaj aŭdinte ke jam en deko da landoj oni laboras pri la sama afero, akceptis entrepreni la provon, spite la tempomankon.

Pro nedispono pri pli bona tradukanto, s-ro Perković petis, ke mi mem urĝe faru la tradukojn en la francan kaj anglan. Por ne perdi tempon, tiujn provizorajn tradukojn, kune kun la Esperanta teksto, li dissendis al la naciaj Unesko-komisionoj de mi indikitaj, kaj al kelkaj aliaj, kun kiuj li havas pli viglajn rilatojn, petante subtenon al la propono.

Samtempe mi skribis al dekduo da esperantistoj kaj asocioj petante kontakti la koncernajn Unesko-komisionojn. Simile agis d-rino Despiney kaj s-ro André Staes, UEA-administranto por la Jubilea Jaro. La rezulto de la kampanjo estis, ke pluraj aktivuloj intervenis ĉe siaj Unesko-komisionoj, kaj ricevis (aŭ ne) diversspecajn promesojn. Min informis pri tia agado Renato Corsetti (Italio), s-ino Isobe Yukiko (Japanio), Tibor Vaskó (Hungario), Ralph Harry (Aŭstralio), S. Prasad Mitra (Hinda Unio), H.M.



La kulturdomo Ljudmila Živkova en Sofio, kie Unesko unuanime akceptis la Rezolucion XI.4.4.218.

Festado de la centjariĝo de Esperanto

La Ĝenerala Konferenco,

Konsiderante, ke ĝi en sia sesio de 1954, okazinta en Montevideo, per la rezolucio IV.1.4.422-4224 notis la rezultojn, atingitajn pere de la internacia lingvo Esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj reciproka kompreniĝo inter la popoloj de la mondo, kaj rekonis, ke tiuj kongruas kun la celoj kaj idealoj de Unesko,

Memorigante, ke Esperanto intertempe faris konsiderindan progreson kiel ilo de kompreniĝo inter popoloj kaj kulturoj de malsamaj landoj, penetrante en la plimulton de la regionoj de la mondo kaj la plimulton de la homaj agadoj,

Rekonante la grandajn eblecojn, kiujn Esperanto prezentas por la internacia kompreniĝo kaj la komunikado inter popoloj de malsamaj naciecoj,

Notante la tre gravan kontribuon de la Esperantomovado, kaj precipe de Universala Esperanto-

Asocio, al la disvastigado de informoj pri la agado de Unesko, same kiel ĝia partopreno en tiu agado,

Konscia pri la fakto, ke en 1987 oni festos la centjariĝon de la ekzisto de Esperanto,

1. **Gratulas** la Esperanto-movadon okaze de ĝia centa datreveno;
2. **Petas** la Ĝeneralan Direktoron daŭre sekvi kun atento la evoluon de Esperanto kiel rimedo por plibonigi la komprenon inter malsamaj nacioj kaj kulturoj;
3. **Invitas** la Ŝtatojn-Membrojn marki la centjariĝon de Esperanto per konvenaj aranĝoj, deklaroj, eldono de specialaj poŝtmarkoj kaj simile, kaj instigi al la enkonduko de studprogramo pri la lingvo-problemo kaj pri Esperanto en siaj lernejoj kaj siaj institucioj de supera edukado;
4. **Rekomendas** al la internaciaj neregistaraj organizaĵoj aliĝi al la festado de la centjariĝo de Esperanto kaj pristudi la eblecon utiligi Esperanton kiel rimedon por disvastigi inter siaj membroj ĉiajn informojn, inkluzive de tiuj pri la agado de Unesko.

Akceptita de la Ĝenerala Konferenco de Unesko la 8an de novembro 1985

Maitzen (Aŭstrio), R. Randrianekena (Malagasa Resp.), M. Ngingi (Kongo) kaj P. Todorov (Bulgario). Pluraj el tiuj intervenoj montriĝis tre efikaj.

La 8an de oktobro, je la malferma tago, mi aperis en la Ĝenerala Konferenco. Kunestis ankaŭ s-ro Petâr Todorov. Kiam mi kontaktis la jugoslavajn delegitojn, evidentiĝis, ke la rezolucipropono ne estis prezentita, ĉar neniu kunsubskribinto sin anoncis. Laŭ ilia opinio mi mem devos akiri tiujn surloke.

La "observanto" ne nur observas

Kaj, mi komencis mian kampanjon. Mi alparolis delegitojn en la ĉefa salono de la konferencejo, kie tabulo montris klare ilian landan apartenon. Aliajn mi alparolis en la koridoro aŭ en la manĝejo, elektante laŭeble la landojn ĉe kiuj ni povus havi ŝancojn. Kelkaj ne montris grandan komprenemon. Aliaj eksimpatiiis kun Esperanto, eĉ kun la rezolucipropono, sed subskribi ĝin signifus alpreni respondecon pri io ne tre konata aŭ utila por la koncerna ŝtato. Iuj devis konsultiĝi kun la tuta delegitaro de sia lando; la afrikaj ŝtatoj subskribas ion nur laŭ kolektiva decido, kaj tiaj kunvenoj okazos nur post kelkaj tagoj, kio prokrastus la transdonon.

Fine, la jugoslava delegitaro akceptis prezenti la proponon je sia propra nomo, kondiĉe ke pliaj subskriboj estu poste aldonitaj. La rezolucipropono, do, aperis oficiale kiel propono de Jugoslavio la 15an de

oktobro, kaj dum la sekvaj kelkaj tagoj aldoniĝis la subskriboj de Bulgario, Ĉinio, Hungario, Kostariko, Pollando kaj San-Marino. Tio estas publikigita en la konferenca "Ĵurnalo" de la 22a de oktobro.

La rezolucipropono aperis tute juste en la Granda Programo XI (11), kiu titoliĝas "La kulturo kaj la estonteco", tamen en la subprogramo XI.1.1., kiu temis pri "inventarado, kolekto kaj pristudo de nefizika kultura heredaĵo". Tiun lokon mi trovis ne la ĝusta kaj postulis, ke oni transloku nian temon al la subprogramo XI.4.4., kies temo estis "internacia kultura kunlaboro", kaj en tio mi sukcesis. Mi postulis ankaŭ, ke al la rezolucipropono oni aldonu paragrafon ĉe la fino, kie oni rekomendu al la Ĝenerala Direktoro envicigi la jubileon de Esperanto inter la jubileoj por 1987, ĉar mi intertempe malkovris, ke tia propono tamen tute ne estis farita. En tio mi ne sukcesis, ĉar montriĝis, ke por tion atingi necesus nuligi la rezoluciproponon, denove peti la subskribojn kaj la opinion de la Ĝenerala Direktoro, kaj tiu proceduro povus malfruigi la tutan aferon.

Intertempe mi petis la parolrajton en la pleno kaj faris 12-minutan paroladon en la angla lingvo, prezentante ĉefe la nunan staton kaj atingojn de la Esperanto-movado. Bedaŭrinde tio okazis malfrue posttagmeze, kaj multaj delegitoj jam foriris. Tamen, la sekvan tagon la parolado aperis presita (en la angla), kaj multaj povis ĝin legi. Post la parolado plu-

raj venis al mi por peti pliajn detalojn pri Esperanto. Post du tagoj la aŭstralia reprezentanto haltigis min en la koridoro: "Mi aŭdis, ke via parolado estis tre interesa, ĉu vi eble havas ĝian kopion?" Kompreneble, mi havis ĉemane presitan ekzempleron.

En la komisiono

Kiam la Kvara Komisiono ekfunkciis, mi tuj okupis mian lokon tie, kaj komencis mian kontaktadon, uzante ĉiujn lingvojn, kiujn mi konas, escepte de Esperanto. Al la brazilano mi parolis pri miaj vojaĝoj tra la ĝangalo, kaj pri nia grava Universala Kongreso tie en 1981; al la argentinano pri grimpadoj al Akonkagvo, kaj poste, kompreneble, pri Esperanto kaj la rezolucipropono. Al la urugvaja delegitino mi memorigis, ke en ŝia lando estis aprobita la unua rezolucio de Unesko favore al Esperanto en 1954; al la meksikano, ke estis lia delegito kies propono estis tiam akceptita. Al la ĉina delegito mi donacis mian libron *Kumeŭaŭa* en la ĉina (kiun li la sekvan nokton tralegis!); al la japana li menciis la eksterordinaran sukceson de tiu libro en lia lando. Al la afrikaj prezentantoj mi parolis pri la bezono de komuna lingvo por la afrikaj popoloj, kaj mi abunde distribuis mian broŝuron *Esperanto, komuna lingvo por Afriko, komuna lingvo por la mondo* (UEA, 1962) kaj multajn Esperanto-dokumentojn de UEA pri la lingvo-problemo. Pluraj el ili unuafoje renkontiĝis kun Esperanto, kaj ili estis profunde impresitaj. Kun multaj mi amikiĝis. Estis inter ili edukministroj kaj aliaj respondecaj funkciuloj. La delegito de Benino informis min, ke venontjare grupo de lingvoprofesoroj okazigos kunvenon pri lingvaj problemoj de Afriko, kaj ke ili nepre invitos min partopreni tiun kunvenon kaj klarigi ĉion pri tiu Esperanto.

"Ĉu ni ne venkos en decida hor'...?"

Fine alvenis la diskuto pri la ĉapitro XI.4.4., en kiu troviĝis nia rezolucipropono. La ĉeftemo estis la starigo de "Jardeko de kultura evoluo", kiu devus komenciĝi en 1988, kaj ĝi estis la centro de la atento por la plimulto de parolantoj. Ankaŭ mi petis la vorton kaj, je la nomo de UEA, promesis plenan apogon al tiu projekto, precipe sur la kampo de kultura interŝanĝo, ĉar tion ni efektive faras jam 98 jarojn. Kaj mi daŭrigis informi pri Esperanto, pri UEA, ĝiaj eldonoj, Esperanto-literaturo, multaj internaciaj kunvenoj, neŭtraleco ktp.

Dum siaj paroladoj tri reprezentantoj menciis nian rezoluciproponon. La jugoslava delegito tute mallonge pledis por ĝia aprobo, la japana reprezentanto faris tion ion pli emfaze, evidente interesita. Fine la delegito el Ebura Bordo (post antaŭe longa interparolo kun mi) diris, ke lia registaro bonvenigas la organizon de la Universala Kongreso de Esperanto en lia lando en 1990, kaj ke li esperas, ke tiu evento estos signifoplena por la akcepto de Esperanto.



D-roj Branislav Ŝoŝkić kaj Ivo Margan de la delegitaro de Jugoslavio, ĉefproponinto de la Unesko-rezolucio favora al Esperanto.

Fine la prezidanto de la Komisiono, s-ro Dumont (delegito el Belgio), komencis voĉdonigi la diversajn rezoluciojn. Iuj estis aprobitaj, aliaj diskutataj aŭ prokrastitaj. Kiam li proksimiĝis al nia numero, en mia obtuza voĉo ripetis la vortojn de Zamenhof: *Ho, mia kor' ne batu maltrankvile... ĉu ni ne venkos en decida hor'?* Subite s-ro Dumont diris:

"Sekvas DR 218. Kiel vi scias, temas pri la rekono de la meritoj de Esperanto kaj ĝia centjarigo. Ni aŭdis la elokventajn informojn de la ĝenerala sekretario de la Esperanto-movado, kaj mi supozas, ke ni ĉiuj estas konvinkitaj pri ĝiaj meritoj. Ĉu iu havas rimarkon?"

Post kvarsekunda plena silento li martelbatis la tablon kaj diris: "Do, akceptita!"

En tiu momento ne gravis, ke mia koro vere forte batadis, kaj ne gravis la mistitolo "ĝenerala sekretario". Gravis la fakto, ke nia rezolucio estis ĉiuvoĉe akceptita.

Almenaŭ tie en la Kvara Komisiono. Laŭorde ĝi devas ĉiujn siajn decidojn prezenti al la Ĝenerala Pleno por definitiva aprobo, kiu (mi eksciis poste) okazis la 8an de novembro. Do, ni povas plene ĝoji.

El la teksto de la rezolucio vi povas vidi, ke ĝi enhavas krom la rekona kaj gratula parto: 1) rekomendon al la Ĝenerala Direktoro, 2) rekomendon al la ŝtatoj-membroj kaj 3) rekomendon al la neregistraj organizaĵoj. Ĉiuj ili povas signifi multon aŭ nenion, kaj tio dependas de nia plua agado.

Antaŭ ol fini, mi menciis, ke la Ĝenerala Direktoro, s-ro Amadou Mahtar M'Bow, al demando de intervjuisto de la bulgara televido donis tre favoran opinion pri Esperanto kaj ĝia estonteco. Du tagojn poste li akceptis min, laŭ mia peto, en sia oficejo. Kiam mi dankis pro liaj belaj vortoj, li respondis: "Tio estas mia konvinko. Ĉar Esperanto estas ne nur lingvo, ĝi estas humanisma movado, kiu celas interkomprenigi popolojn kaj kulturojn de la mondo."

Tibor Sekelj

Diplomoj de AIS estos oficialaj en San-Marino

La 31an de oktobro la sanmarina parlamento aprobis kadran leĝon pri universitatnivelaĵoj studoj kaj akademiaj titoloj, akireblaj de tiu ŝtato de 61 kvadrataj kilometroj.

Ekde la 2a Sanmarina Universitata Sesio (SUS), kiu okazos de la 27a de decembro ĝis la 5a de januaro 1986, Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) transprenos i.a. la okazigon de universitataj kursoj kaj prelegserioj kaj ekde 1986 la ekzamenadon de kandidatoj, celantaj doktoriĝon aŭ akiron de alia titolo, difinita en la leĝo. Tia distingo okazos per ŝtata dokumento de oficiala reprezentanto de la Ministerio pri Klerigo kaj Kulturo. La detaloj pri la mandato, kiun ricevos AIS kadre de la nova leĝo, estos fintraktitaj en decembro.

La statuto de AIS, jam jure oficialigita, konfirmas, ke la Internacia Lingvo estas la ĉefa laborlingvo, sed krome adoptas por nedifinita tempo la italan, anglan, francan kaj germanan.

Oni petas kunlaborpretajn sciencistojn turni sin al la provizora sekretariejo de AIS, p/a IfK, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio, kiu povas informi ankaŭ pri la okazonta 2a Sanmarina Universitata Sesio.

FAKA AGADO

Nur por komputistoj?

En marto aperis la unua numero de *Aktuala komputiko*, revuo kun fakaj originalaĵoj pri la scienco kaj teknologio de komputiloj. La imagata legantaro estas malvasta kompare kun tiu de *Internacia komputado*, kiu celas ĉiun. La redaktoro-eldonanto kolektis materialon kaj ĝin fotokopiis. Tiu metodo estas vaste aplikata en eldonado de fakaj revuoj aŭ konferenc-dokumentoj nacilingvaj, kaj estas pli enkondukinda en nia libromerkato. Kiel malavantaĝo, restas simplaj gramatikaj eraroj ne tuŝitaj. La tikla demando pri terminoj estas lasita al la bontrovo de la unuopa verkinto. Mi mencias du indajn terminojn: *diĝita*, t.e. neanaloga, kaj *skeni*, alie esprimebla kiel *balai linion* en televido. [Red.: Ĉu „skandi” restu poezia?]

Jen la enhavo de la unua kajero. Christian Bertin prezentas la eksperimenton Tisane, sistemon por sendi kaj bildon kaj sonon tra reto; unu el la plej

modernaj tendencoj de informo-servado multimedia. Ŝajnas, ke informo-redukto en la diĝita faksimila reto estas integrida.

Boris Gärtner kontribuas du artikolojn: la unua temas pri programado, precipe en *rekursiva* (aŭ *rikura*) priskribo. Tio utilas, ĉar ĝenerale la koncepto de rekursiveco estas malfacile kaptebla. La dua analizas econ de la programlingvo Algol 60, eksmodiĝinta sed ankoraŭ alte taksata de la fervoraj adeptoj, kompare kun Algol 68.

M. Vanden Bempt klarigas, ke necesas kiel eble plej malvastigi dubajn okazojn, por produkti bonan sistemon; jen afero dire facila sed efektive malfacila.

Eĉ se la artikoloj en ĉi tiu numero ne rekte rilatas al via fako, mi alvokas komputistojn, ke la entrepreno estas subtenenda per aĉeto kaj plua kontribuo. Eĉ en naciaj lingvoj oni subtenas ion tian, se minimume 10 % el la artikoloj interesas onin. Tio des pli veras por la nove bakita esperantaĵo.

Aktuala komputiko haveblas de s-ro Christian Bertin, CCETT AIS, B.P. 59, Rue du Clos Courtel, F-35510 Cesson-Sévigné, Francio.

Sibayama Zyun'iti

INFORMADO

Alvokas grava internacia asocio por esplorado

En aprilo-majo 1987 AIMAV (Internacia Asocio por la Esploro kaj Disvastigo de Aŭdvidaj kaj Struktursumaj Metodoj) okazigos ĉe Universitato de Gent (Belgio) plurtagan internacian kolokvon nacilingvan pri la problemaro rilate al la disvastigo kaj la pedagogio de tiel nomataj "internaciaj lingvoj". AIMAV, kies franclingva nomo estas Association Internationale pour la Recherche et la Diffusion des Méthodes Audio-Visuelles et Structuro-Globales, estas neregistara organizaĵo en Konsultaj Rilatoj kun Unesko.

La proponita temo de la kolokvo estas "La valoro de universala 'lingua franca' [latine: interlingvo], natura aŭ planita", kiun oni pritraktos el kvar vidpunktoj: komunika, psikologia, pedagogia kaj sociokultura.

La kolokvo donos okazon funde analizi la lingvan situacion en Eŭropa Komunumo, Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, pritrakti la specifan staton de la angla lingvo en la mondo, kritikeme konsideri ĉiujn jam proponitajn solvojn kaj rimedojn kaj precipe prezenti Esperanton altnivele en ĉiuj ĝiaj aspektoj.

La uzotaj lingvoj estos la franca, nederlanda, angla kaj Esperanto. Ĉiuj referaĵoj poste aperos en libro, eldonota de AIMAV en unu el ĝiaj sciencaj serioj.

Ni nun serĉas kunlaborantojn, kiuj konsentas fari kelkajn esplorajn aŭ kompilajn laborojn aŭ prezenti referaĵojn. La rilata oficiala cirkulero de AIMAV aperos en februaro-marto 1986 kaj estos tre larĝe disvastigata.

La ĉefa celo estas informi neesperantistajn esploristojn, instruistojn, universitatanojn kaj oficialajn lingvo-respondeculojn de internaciaj organizaĵoj pri Esperanto. Seriozaj esperantistoj, kiuj estas kvalifitaj kunlabori, bonvolu kontakti s-ron Edward Symoens, Putsesteenweg 131/A, B-2180 Kalmthout, Belgio.

Esperanton ombrele

En numero 12/1983 de *La revuo orienta*, organo de Japana Esperanto-Instituto, aperis kelkaj desegnaĵoj pri Zamenhof sub la titolo "Ĉu ili zamenhofas liphare?". Tiuj de Kawamoto Hiromi el Tokio aparte kaptas la atenton. Li permesis al ni reprodukti liajn verkojn. Laŭ tipe japana modesteco, li priskribas sin kiel "salajrulo tute banala"!



La ideo pri "Superzam" havas longan historion en la movado, deveninte el nemovadaj fontoj. Sed ĉu ne



allogas la ombrelo de tiu afabla maljunulo – preskaŭ centjara – kiu protektas kontraŭ militaj detruiloj? Ĝi estas originale plaĉa simbolo de la paca rolo de Esperanto, dum la movado de jardekoj ne sukcesas trovi facile kompreneblan manieron desegne simboli sin al la ekstera publiko. Kaj al "esence vorta movado" kiel nia forte mankas taŭgaj simboloj. Kompreneble, la ekstera publiko ne konscius, ke temas pri bildo de Zamenhof, sed la verko de Kawamoto, krom montri lin nebanala, atestas, ke vere eblas pli efika bildigo de la ideoj de la Esperantomovado.



La redakcio de la revuo *Esperanto* volonte ricevas taŭgajn desegnaĵojn, kiel ankaŭ fotojn.

ELDONADO

Festlibra atuto por la internacilingva kulturo

Antaŭ nelonge prof. Juan Régulo Pérez, fama movada eldonisto sub la blazono "Stafeto" kaj Honora Membro de UEA, emeritiĝis de Universitato de La Laguna (Kanariaj Insuloj) post 40-jara deĵoro kiel ĝia profesoro pri la historio de la hispana lingvo kaj Esperanto. La universitato decidis eldoni festlibron kun la latina titolo *Serta gratulatoria in honorem Juan Régulo* (Gratulkolekto honore al Juan Régulo). La eĥo de la invito al kontribuoj estis tiel vasta, ke la festlibro aperos en tri grandegaj volumoj.

Volumo 1 estos dediĉita al filologio ne-Esperanta. Temas pri impona, fortika volumo, sur bona papero, tolbindita, en la formato 17×24cm, kun 776 paĝoj.

Ĝi enhavas 61 kontribuaĵojn plus enkondukojn. Inter multaj artikoloj de hispanaj kaj alilandaj famuloj estas pecoj de elstaraj esperantistoj, ekz. Arthur Baur (pri la romanĉa lingvo), Cesar Apreotesei (pri fremdvortoj en la rumana), Ignart Bociort (beletra temo pri Aristotelo), Árni Böðvarsson (pri latina influo en la islanda), Chen Yuan (pri la evoluo de la ĉina skribsistemo), Itamar Even-Zohar (pri la naskiĝo de la novhebrea kulturo), D.B. Gregor (pri romanja beletra verko), Katherine Hall (pri la poezio de Bellary), Erling Anker Haugen (pri la Sigurd-kantoj), David Jordan (pri la mandarena en Tajvano), Carmel Mallia (pri la malta literaturo), William Solzbacher (pri la polineziaj lingvoj), István Szerdahelyi (pri la filozofia lingvo de Raimundus Lullus) kaj Pierre Ullman (pri verko de Pérez Galdós, analizita laŭ la teorioj de Frye).

Tiu unua volumo havas artikolojn en pluraj lingvoj: ĉefe en la hispana, sed ankaŭ en Esperanto, la rumana, germana, angla, vaska, galega kaj portugala. Esperanto estas traktita egalrajte kaj samnivele kiel aliaj kulturlingvoj por scienca literaturo.

Volumo 2, nun kompostata, estos dediĉita tute al "Esperantismo". La amplekso estos proksimume egala al tiu de la unua volumo, kun la sekvaj 53 artikoloj: Antonio-Miguel Bernal (Prezentado), Humphrey Tonkin (Enkonduko), Paul Ariste (Liva poezio en Esperanto), William Auld (Kulturbazo historia de la Esperanto-movado), Julius Balbin (Kial mi verkas Esperante?), Vilmos Benczik (La rolo de la eldonejo Stafeto en la konservado de la kontinueco de la Esperanta literaturo), Roger Bernard (Esperantaj kabaretoj), Detlev Blanke (Pri la termino "planlingvo"), Werner Bormann (Mondlingvo longperiode), Marjorie Boulton (La Barlastona travivaĵo: Satura metodo de lingvolernado, rilate al Esperanto), Probal Daşgupto (Adverboj en Esperanto), Fernando de Diego (Genezo kaj traduk-problemoj de la Esperanta *Don Quijote*), Michel Duc Goninaz (Kiel priskribi Esperanton? Problemoj metodologiaj kaj terminologiaj), Aleksandr Duliĉenko (Pri la principoj de kreado de la historio de lingvoprojektado), Rüdiger Eichholz (Esperanto kiel interlingvo en maŝina tradukado), Tadeusz Ejsmont (Nuntempo kaj Esperanta idearo), Peter Forster (angle: Kelkaj sociaj fontoj de rezisto kontraŭ Esperanto), Aldo de' Giorgi (La rolo de eldonistoj en la Esperanto-

vortoj en Antaŭparolo de la Unua Libro; B: Propraj nomoj en Ekzercoj de la Dua Libro), Leopoldo Knoedt (La oreloj de profesoro Juan Régulo Pérez), Edwin de Kock (La Regula "Stafeto" kaj la originala Esperanta poezio), Boris Kolker (Kontribuo de la rusa lingvo al la verba sistemo de Esperanto), Jiří



Kořínek (Taskoj de nia literaturo beletra kaj faka), Ivo Lapenna (Juraj terminologiaj problemoj kun aparta konsidero al la Esperantlingva jura terminologio), Ulrich Lins (La baraktado de IPE. Ĉapitro de la historio de la laborista Esperanto-movado), Marie-Thérèse Lloancy (france: La vortludoj en tri verkoj de Raymond Schwarz eldonitaj de "Stafeto": *La Zamenhofa Esperanto*, *Kiel akvo de l' rivero* kaj ... *kun siaspeca spico!*), G.F. Makkink (Pri la artikolo en Esperanto), Stefan Maul (Ĉu eblas revoluciigi la internacian inform-sistemon helpe de la internacia lingvo Esperanto?), Geraldo Mattos (Lingvistika priskribo de la verbo en Esperanto), Miyamoto Masao (Juan Régulo Pérez kaj la Esperanta originala literaturo), Paul Neergaard (Plantnomoj en la Lingvo Internacia), Vlastimil Novobilský (Kontribuo de ĉefaj verkistoj al la Esperanta literaturo), Violin Oljanov (La Plena analiza gramatiko de Esperanto), Manuel de Paz Sánchez (hispane: Kanaria framasonismo kaj Esperanto: Projekto de la loĝio Afortunado N-ro 5), Fabrizio Pennacchietti (Kaŝaj kaj mal-kaŝaj reflektivaj prefiksoidoj en Esperanto), Karolo Pič (Simpozio pri -ata/-ita), Wouter Pilger (Problemoj de esperantigo de nederland(lingv)aj loknomoj), Claude Piron (Esperanto, formo de humanismo), Baldur Ragnarsson (Esperanto kiel anti-lingvo), Olav Reiersøl/Richard Wood (angle: Komparo de la uzo de kelkaj sufiksoj en Esperanto kaj la angla), Johan Hammond Rosbach (Dedalo kaj Ikaro), Reto Rossetti (angle: Bernard Shaw pri la demando de internacia lingvo en korespondado kun Reto Rossetti 1949-1950), M.H. Saheb-Zamani (Irano, islamo kaj la supernacia lingvo Esperanto), C. Støp-Bowitz (Biologiaj nomenklaturetoj kaj ilia esperantigo), Humphrey Tonkin (Esperanto: kulturo, lingvo, historio), Henri Vatré (Vort-statistikaj esploroj ĉe 15 novelis-



Ampleksa festvolumaro estas bela honoro por Juan Régulo Pérez, kies eldona agado sub "Stafeto" signifis tiel multe al la Esperanta literaturo ekde 1952.

movado kaj la krizo de la Esperanta poezio post "Stafeto"), Bernard Golden (Principoj por la esperantigo de hispanlingvaj vortoj kaj propraj nomoj), Reinhard Haupenthal (germane: Albert Schramm (1880-1937), Forgesita Esperanto-pioniro), Itô Kanzi (La unua unua unua libro), Kawasaki Naokazu (A: Fremdaj

toj), Alec Venture (La historio de la Esperantaj lingvaj institucioj), Gaston Waringhien (25 jaroj el la vivo de esperantista eldonejo), John Wells (Hispanaj kaj anglaj problemoj en la prononcado de Esperanto), Peter Zlatnar (La internacia lingvo Esperanto en la lerneja sistemo de lingvo-instruado – spertoj el Jugoslavio), Ljubomir Mihajlov (Pri unu provo de kritiko kontraŭ *Plena analiza gramatiko de Esperanto*).

La materialo por Volumo 3 nun estas redaktata. Ankaŭ en tiu volumo estas multaj artikoloj de elstaraj esperantistoj, iuj en Esperanto. Ĝi verŝajne havos du partojn, ĉar la veninta materialo estas preskaŭ samampleksa kiel tiu por la unuaj du volumoj kune!

INFORMADO

LPLP: Pli da Esperanto, malpli da defcito

La irlanda lingva situacio, lingvo-instruado en Kanado, la situacio de la sinhala lingvo en Srilanko, la utiligo de la portugala en Unesko, la interpretado de gesta lingvo, la hispanlingvaj komunikiloj en Usono — jen kelkaj el la temoj reprezentataj en lastatempaj numeroj de la revuo *Language Problems and Language Planning* (Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado).

Tiu revuo estas eldonata de Universitato de Teksaso sub aŭspicio de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo, la esplora fakto de Universala Esperanto-Asocio. Ĝi enhavas fakajn artikolojn pri plej diversaj temoj en diversaj lingvoj, recenzojn kaj novaĵojn. Ĝi aperas trifoje jare sur tricento da paĝoj.

La plej aktuala numero, n-ro 2 de 1985, enhavas artikolojn pri la situacio de la hispanlingva komunikilaro en Usono (de Dennis Bixler Márquez), pri la terminaro de lingvistiko (Marcel Danesi), pri interpretado de gesta lingvo (Roland Wesemaël), pri ĉinlingva ortografio (David Jordan) kaj pri eventuala enkonduko de la portugala lingvo en Uneskon (Akiko Woessink-Nagata). Aperas ankaŭ recenzoj kaj novaĵoj, kaj ampleksa raporto pri la Konferenco de CED pri Lingvo kaj Komunikado en decembro 1984.

La jaro 1985 estas signifa jaro por *LPLP*. Transprenis la gvidadon de la redakcio d-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, kiu tuj enkondukis diversajn ŝanĝojn. Li akceptis artikolojn ankaŭ en Esperanto; li klopodis pliinternaciigi la revuon, kaj li forigis la defciton.

La unua longa artikolo en Esperanto aperis en n-ro 1/1985, kaj estis bone akceptita. D-ro Tonkin argumentas, ne ke la revuo iel esperantiĝis, sed ke pli da fakuloj pri lingvistiko nun akceptas Esperanton kaj eventuale mem uzas ĝin. Do, la revuo tenas sian fakan objektivecon, sed donas pli da atento al Esperanto. Dua, pli mallonga artikolo en Esperanto aperis en n-ro 2/1985, kaj aliaj sekvos.

Se temas pri la defcito, ĝin oni eliminis per reformo de la ekspedo-sistemo, strikta limigo de la paĝonombro kaj redukto de la nombro de senpagaj kaj interŝanĝaj abonoj.

Estontaj numeroj de la revuo enhavos artikolojn i.a. pri lingvo-ekonomiko kaj la instruado de Esperanto en elementaj lernejoj. Oni antaŭvidas, ke ĉiu numero de la revuo enhavos kontribuaĵojn el minimume seso da landoj kaj en almenaŭ kvar lingvoj. Ĉiun artikolon akompanos longa resumo en Esperanto.

LPLP estas prestiĝa kaj konata revuo en la fako lingvistiko kaj socilingvistiko kaj konvinka pruvo pri la efikeco de Esperanto kiel faka lingvo. Ĝi ankaŭ donas interesan superrigardon pri temoj najbaraj al la Esperanto-movado. Jarabono kostas 18 usonajn dolarojn (27 dolarojn por institucioj), kaj la revuo estas abonebla ĉe la Libro servo de UEA.

Telekomuniki movadajn informojn

La nuntempa teknika evoluo en la telekomunikado estas mirige rapida. Kiel ni povas plej bone utiligi ĝin, por kiel eble plej efike kaj rapide disvastigi informojn? En la sekva artikolo, Grahame Leon-Smith, komitatano de UEA, rekomendas, ke UEA kaj landaj Esperanto-asocioj provu la mikrokomputilan telekomunan sistemon Microlink. Ĉu la movado pretus sufiĉe reorganizi sin por tuj transsendi kaj tuj utiligi novaĵojn?

Kvankam la esperantistoj jam delonge solvis la internacian lingvo-problemon, ni ankoraŭ ne solvis la komunikan problemon. La tradicia poŝta servo estas ege malrapida por internacia uzo, tiel ke necesas, ke ni konsideru la novajn teknikajn komunikilojn. Ekzistas jam 1,5 milionoj da teleks-abonantoj tra la mondo, sed tiu sistemo estas malnova kaj ege multekosta por akiri. Eble la plej taŭga metodo por ligi kaj Esperanto-oficejojn kaj individuajn esperantistojn estas la nova elektrona poŝto, kiu uzas la kutiman telefonan reton kaj kiu estas facile kaj malmultekoste alirebla per preskaŭ ĉiu mikrokomputilo.


Post iom da esploro mi venis al la konkludo, ke eble la plej taŭga sistemo el la pluraj jam ekzistantaj

estas Dialcom, kreita de la internacia kompanio ITT. Tiu sistemo jam funkcias en diversaj landoj kaj pliaj daŭre aldoniĝas. Ĝi havas malsamajn nomojn en la diversaj landoj, ekzemple en Britujo ĝi nomiĝas Telecom Gold. Pere de tiu internacia reto oni nun starigas Microlink, kiu celas ligi uzantojn de mikrokomputiloj tra la mondo je minimuma kosto.

La kosto ja estas sufiĉe malalta: unufoja aliĝkosto estas en Britujo 5 pundoj (21 gld.), kaj poste oni pagas nur 3 pundojn (12,60 gld.) por uzi la servon plus la konektokostojn de maksimume po 3,5 pencoj (15 cendoj) por minuto. Por kiel eble plej multe ŝpari tiujn kostojn, oni povas prepari ĉiujn mesaĝojn en la komputilo mem, antaŭ ol konektiĝi. De Britujo oni povas sendi mesaĝon de 2 048 literoj (egalan al pli ol A4-paĝo) al alia eŭropa lando kontraŭ nur 20 pencoj (84 cendoj), dum al Usono, Aŭstralio aŭ Azio kontraŭ 30 pencoj (1,26 gld.). Aldona unuo de ĝis 1 024 literoj kostas respektive 10 kaj 15 pencojn (42 kaj 63 cendoj). Aparte interesa por la Esperanto-movado estas la ebleco sendi la saman mesaĝon al ĝis 500 celoj en la sama lando kontraŭ la kosto de nur unu mesaĝo.

Microlink ebligas al ĉiuj abonantoj uzi ankaŭ la ekzistantan teleksilan reton por sendi kaj ricevi teleksojn al kaj de la tuta mondo. Tio kostas nur unufojan aliĝkotizon de 10 pundoj (42 gld.), kaj la sendokostoj, ekzemple por 100 literoj el Britujo, estas po 11 pencoj (46 cendoj) al eŭropaj landoj, po 16,5 pencoj (69 cendoj) al Usono, kaj 1,15 pundoj (4,83 gulde-

Unesco Features



noj) al la plej malproksimaj mondpartoj. Ricevi telekson kostas 50 pencojn (2,10 gld.) el iu ajn lando.

Loĝantoj de landoj, kiuj ankoraŭ ne havas la sistemon Dialcom, tamen povas uzi ĝin per la t.n. IPSS, Internaciaj Pak-komutaj Servoj. Tio ebligas sendi informojn de unu komputilo al alia eĉ de lando al lando kontraŭ la kosto de loka telefonvoko. La plimulto de landoj jam aliĝis al IPSS. Por uzi IPSS en Britujo, oni tutsimple aliras la komputilon Telecom Gold en Londono kaj sendas mesaĝojn kiel loĝanto de Britujo.

Grahame Leon-Smith

INFORMADO

Por informi trafe, iom da psikologio

Vortoj agas. Tiu principo, bone konata de reklamistoj kaj propagandistoj, ankoraŭ ne estas sufiĉe komprenata de la esperantistoj informantaj pri la lingvo. Ni ripete diskonigas Esperanton mistrafe, ĉar ni ne sufiĉe atentis la nuancojn, kiuj difinas la sintenon de la celata publiko.

Vortoj ja ne nur priskribas aŭ sciigas; ili ankaŭ – kaj ĉefe – elvokas. La elvokaĵoj ofte ne estas klare konsciataj. Ili estas kvazaŭ songaj bildoj, kiuj interplektiĝas fone de la menso, tiel kreante etoson, kiu siavice naskos bildaron kun firmigo kaj evoluigo de la etoso.

Tiu mensa fono tre gravas, ĉar el ĝi fontas la sintenoj. Fakte, la mensa etoso ludas pli gravan rolon en decidoj ol racia rezonado. Tial, i.a., kiel ajn pura la intenco, kiom ajn pravaj la argumentoj, la racia prezentado de Esperanto ree kaj ree fiaskas.

La koncepto "plani"

Komplikas la problemon la fakto, ke tiuj elvokaĵoj diferencas laŭ la kulturo, la popolo, la socia aparteno. Mi ne scias, ĉu la esprimo *planlingvo* estas trafa por germanoj. Eble jes. Sed ĝi fuŝ-agas ĉe homoj kun latinida lingvo, kaj eble ankaŭ ĉe anglalingvanoj. Ĉe homoj nutritaj de latinida kulturo, la asocio de planado kaj de lingvo elvokas ion sakrilegian. Ĝi produktas sentojn pri io burokrata, nehoma, kontraŭa al ĉiaj spontaneco kaj poezio. Ĝi pensigas al la rigideco de skemo en kampo, kie homoj sopiras al vivo disfloranta. La esprimo *konstruita lingvo*, kiun kelkaj uzas, ne efikas pli bone. En franclingvujo, laŭ miaj esploroj pri la psikologia efiko de vortoj, la dirmaniero, kiu montriĝas plej taŭga por eviti forpuŝan sintenon, estas *konvencia lingvo*.


Cetere notindas, ke Zamenhof ne agis plane. Li ne elpensis planon, kiun li konsekvence realigis. Lia maniero labori pli similis la agadon de pentristo ol de inĝeniero aŭ de planisto ekonomia. Se ne, kiel klarigi la fakton, ke la latina *-tio* produktas jen *"-ĉo"* (kon-diĉo), jen *"cio"* (nacio), jen *"-ciono"* (leciono) aŭ ke la latina *ex-* povas naski ĉu *"es-"* (esprimi), ĉu *"e-"* (etendi), ĉu *"eks-"* (eksciti)? Kial *"ŝtono"*, sed ne **anŝtataŭ*, kiel postulus la pure germana etimologio? Eĉ tia tipa elemento kiel la artikolo *"la"* rezultas, ne el racia pensado, sed el songo, kiel li mem foje klarigis.

Oni povus multigi la ekzemplojn. Ili montras, ke Zamenhof ne agis sisteme, kaj do ne plane. Pro la elvoka efiko de la koncepto *plani*, rilate al io tiel intima kiel lingvo, ni estu plej singardaj, uzante la vorton *planlingvo*.

La koncepto "krei"

Nun kiam la Centjara Jubileo de Esperanto proksimiĝas, oni multe parolas pri lingvo "kreita en 1887". Ree esprimo samtempe nevera kaj psikologie mistrafa.

Nevera, ĉar Esperanto estas multe pli ol la lingvaĵo de 1887. Ĝi naskiĝis sufiĉe longe antaŭ tiu fama



dato. Dokumente proveblas, ke jam en 1878 la lingvo ekzistis, sub alia formo, jes ja, sed kun ne pli da diferenco, rilate al la nuna aspekto, ol la malnovaj franca, angla, rusa rilate al la nuntempaj. Estas la sama lingvo – kun sama identeco – eĉ se nesimila – kun malsama aspekto. Ne ekzistas rompo inter tiu stato de la lingvo kaj tiu de 1887, same kiel ne okazis rompo inter la lingvo de 1887 kaj la hodiaŭa.

Plie, se vi diras: "Zamenhof kreis (inventis, elpensis) Esperanton", vi misprezentas la historian veron, ĉar ne vivus la lingvo, se nur Zamenhof ekzistus. Sufiĉas preni numeron de *Esperanto* kaj analizi, kiom el ĝia lingvaĵo estas zamenhofa, por tuj vidi, kiom la lingvo ŝuldas al aliuloj. Zamenhof mem ĉiam rifuzis, ke oni nomu lin kreinto. Kiel li mem petis, oni diru, ke li *iniciatis* la lingvon. Tiu estis kunkreita de li kaj de multegaj uzantoj, jen famaj (verkistoj, gramatikistoj), jen simple anonimuloj.

La rilatoj inter Zamenhof kaj la kolektivo, kiu akceptis lian proponon kaj tiel estigis vivantan lingvon, similas al la rilatoj inter homo plantinta glanon kaj la grundo, kie kreskas la kverko. Preskaŭ ĉiuj karakterizoj de la arbo venas de la glano, kiel preskaŭ ĉiuj trajtoj de Esperanto originas el Zamenhof, sed sen la grundo kaj la cirkonstancoj (pluvo, suno, apuda ĉirkaŭaĵo), la kverko ne estus tia, kia ĝi estas. Same pri la Internacia Lingvo. Ĝi estas, kio ĝi estas, ne nur pro Zamenhof, sed pro la esperantistaro kaj pro diversaj historiaj aŭ aliaj cirkonstancoj, kiuj evoluigis ĝin en tiu direkto kaj ne en iu alia.

Psikologie mistrafas paroli pri kreado fare de Zamenhof, ĉar lingvo estas sentata de la plimulto kiel vivanta estaĵo. Diru: "Lingvo ne estas biologia afero,

sed socia" sukcesas nur veki en la aliulo senton esti nekomprenebla, ofte eĉ forĵetata kaj lokita en malsupera pozicio. Kvazaŭ vi sciis pri lingvoj, kaj li ne. Ni tiel malhelpas la komunikon kaj ŝokas senton naturan. Kial natura? Ĉar lingvo havas efektive multon komunan kun vivaĵo: ĝi devenas de io praa, ĝi en komenca stadio montriĝas mankhava kaj mallerta, poste ĝi kreskas, maturiĝas, disfloras, ĝi mem reagis al cirkonstancoj, nature adaptiĝante, kaj ĝi konstante ŝanĝiĝas, tamen restante si mem. Komparu kun aŭto, skribmaŝino aŭ muzikdisko, kaj vi preceptos, kiom lingvo pli similas al io vivanta ol al aĵo.

Dirante: "Esperanto estis kreita de Zamenhof en 1887", ni donas la impreson, ke li fabrikis en kelkaj semajnoj viv-imitan, sed fakte senvivan, roboton. Tiu frazo ja implicas, ke unu homo ĉion decidis, plej arbitre. Kontraŭ tia ideo nia kunparolanto, pro sana prilingva instinkto, spontane ribelos. Nia vortigo elvokas estaĵon, kiu devus vivi, sed havas nur patron, ne patrinon. Tio estas grava, ĉar profunde en nia psiko nia lingvo estas asociita al rilato kun patrino. En la plimulto el la lingvoj oni diras ne *gepatra* lingvo, sed *patrina*. Lingvo kreita de viro, aginta sola en sia kabineto, povas esti nur monstro. Monstro forpuŝas. Tial multaj homoj, ne volante rigardi, kiel Esperanto prezentigis praktike – ni komprenu ilin: monstro ne estas alloga – jam principe ĝin forĵetas.

Kion oni do diru? Ekzemple: "Esperanto estiĝis jene. En plej diversaj landoj ekzistis homoj, kiuj sopiris al komunikilo ebliganta al malsamlingvanoj interkompreniĝi. Juna poligloto proponis lingvaĵon, kiun li verkis dum jaroj, komponante poemojn kaj tradukante ĉefverkojn el diversaj literaturoj. La unuaj alprenis la komunikilon proponitan de la dua, kaj la uzado estigis vivantan lingvon, kiun oni nun nomas Esperanto". 1887 estas nur la dato de la publikigo de la propono. Oni ne prezentu ĝin kiel daton de lingvo-estigo.

La koncepto "universala"

Tria ekzemplo estas la vorto *universala*. Ĝi entenas elvokan signifon de "ĉio" aŭ "tuto". Ĝi elvokas ion, kio ĉion invadas, ĉion volas ampleksi. Ĝi naskas fone de la menso bildon de konkeranto, kiu intencas submeti al si la *tutan* mondon, aŭ de kodo, kiun oni trudos al *ĉiuj*. Tia vorto vekas timon, ke la propra lingvo ne plu povos ekzisti. Se la metra sistemo fariĝos universala, oni ne plu uzos la malnovajn mezurojn. Kial estus malsame pri universala lingvo? La monstra roboto ĉi-supre menciita montriĝas ne nur nehoma, sed ankaŭ ema forigi ĉion, kio ne estas ĝi. Kiel en sciencfikcia verko, la veraj vivantoj malaperos, cedante la tutan lokon al universalvora malnaturaĵo.

Samspecan timon povas veki sloganoj kiel "la lingvo por ĉiuj". Estas psikologie nature reagi al ili, pensante: "Ne por mi, mi volas resti libera".

La vorto *internacia* – kiun uzis Zamenhof – elvokas tute alian etoson. Ĝi emfazas, ke temas pri lingvo uzenda *inter* popoloj, nacioj, homoj. Ĝi estas peranto, servanto. Ne inkluzivante la koncepton de tuteco, ĝi lasas al ĉiu unuopulo la eblecon memstare elekti. Ĝi dissendas la mesaĝon: "Esperanto estas lingvo por tiuj, kiuj deziras ĝin; se vi ne interesiĝas pri ĝi, ĝi ne volas trudi sin al vi". Tial ĝi ne kaŭzas defendreflekson.

Ni konsciiĝu pri la elvoka efiko de vortoj

Ofte uzataj de esperantistoj, la tri esprimoj ĵus pritraktitaj efikis kontraŭ-intence, estigante multajn malfavorajn reagojn. Ni ne kulpigu pri tio la Esperantan komunumon. Lingvo – kaj speciale lingvo eksterseria, kiel Esperanto – estas tiel kompleksa fenomeno, ke preteratenti la nuancojn en ĝia priskribo aŭ prezento estas tute nature.

Krome, la kaŭzo de la reago ne estas nur nia, ĝi ofte kuŝas ankaŭ en timo ĉe la celata publiko. Mult-

foje, dum ni diras "internacia", niaj aŭskultantoj aŭdas "universala" kaj ili reagas, ne al nia diro, sed al sia (mis)kompreno.

Tamen nun, kiam ni intencas uzi la okazon de centjareco por vaste informi, ni ne forgesu, ke la efiko de niaj vortoj gravas, kaj ke ĝi ne obeas la leĝojn de racio. Aŭ, eble, ĝi obeas la leĝojn de racio pli subtila, ol tiu, pri kiu oni unuavide pensas. Estas ja fakto, ke Esperanto estas pli vivanta kaj spontana ol la simpla plenumo de plano; ke ĝi estas peranto, ne imperiisto celanta sufoki la tutan mondon sub si; ke ĝi ne estis kreita de unu homo en 1887, sed rezultas el longa procezo, en kiu arto kaj sentoj rolis same grave kiel plananta racio.

Kion ni festos, tio estas la publikigo de projekto. Tiu projekto havis kaj havas neimageble riĉajn latentajojn, sed por ke la kaŝita riĉo manifestiĝu – t.e. por ke Esperanto estiĝu – necesis io pli ol la homo, kiu prave postulis, ke oni lin nomu nur *iniciatinto*. Pri tio la publiko nepre devas scii.

Claude Piron



Kongresa Komunikilo

71a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Pekino (Ĉinio)

26 julio – 2 aŭgusto 1986

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Adreso de LKK: p/a Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 825, Beijing, PR Ĉinio.

Honora Komitato: La 71a UK okazos kun plena apogo de la plej altaj ĉinaj aŭtoritatoj. La Honoran Komitaton jam konsentis eniri pluraj el la plej altaj ĉinaj funkciuloj, sciencistoj kaj artistoj. Ĝian plenan konsiston ni komunikos pli poste, sed la nomo de ĝia prezidanto estas jam delonge konata: temas pri s-ro Huang Hua, la unua ĉina ambasadoro ĉe UN, eksministro pri eksteraj aferoj, nuntempe vicprezidanto de la parlamento. Li jam en februaro akceptis delegacion de UEA kaj LKK por longa kaj detala interparolo pri diversaj demandoj. Tian intereson pri la UK montras ankaŭ aliaj Honoraj Komitatanoj. En Ĉinio la Honora Komitato ludas tre aktivan rolon anstataŭ esti nur surpapera ornamaĵo de la Kongreso.

Kongresaj ejoj: Pro manko de adekvata kongrescentro en Pekino, la 71a UK disvolviĝos en pluraj institucioj. La Inaŭguro, Malfermo, Bankedo kaj Balo havos lokon en la ĉina parlamentejo, la impona Popola Halo. La tutvesperaj artaj aranĝoj okazos en

diversaj teatraj salonoj, dum la ĉefaj kongresaj laboroj disvolviĝos en la pekina Scienca Halo, kie ni disponos pri dudeko da salonoj kun kapacito de 25 ĝis 500 sidlokoj.

Ekskursoj: LKK kaj Ĉina Internacia Turisma Servo kalkulas, ke preskaŭ ĉiu kongresano deziras aliĝi al unu aŭ pluraj ekskursoj, kiuj tial abundas antaŭ, dum kaj post la kongresa semajno. Kiel videblas en la Dua Bulteno, verŝajne temos pri dudeko da ekskursoj. Tuttaga ekskurso al la Granda Muro estas planata por ĉiuj kongresanoj, kaj ĝi estas inkluzivita en la prezo de la kongressemajna restado en Pekino. Same estas pri du duontagaj ekskursoj al la Imperiestra Palaco kaj Somera Palaco. Krome, eblos aliĝi al du aliaj duontagaj ekskursoj dum la semajno.

Depende de la flugvojaĝo elektota, parto de la kongresanoj havos eblecon aliĝi al apartaj antaŭ- aŭ postkongresaj ekskursoj tra Ĉinio. Plimulto de ili okazos aviadile, sed kelkaj inkluzivos ankaŭ riverŝipan transporton. Estus malfacile ĉi tie priskribi ĉiujn celojn de la ekskursoj, sed oni notu, ke temas pri preskaŭ ĉiuj provincoj de la vasta lando kaj pri urboj kiel Ŝanhajo, Kanton, Wuhan, Chonqing, Chengdu, Kunming, Dalian, Shenyang, Harbin, Hangzhou, Suzhou, Nankino, Xi'an... Eĉ la malproksima Tibeto estos unu el la celoj.

Ankaŭ por la kongresanoj, kiuj ne povos resti longe kaj pagi ekskursojn tra diversaj partoj de la lando, estas planataj du- aŭ tritagaj ekskursetoj senpere antaŭ aŭ post la semajno. Eĉ se oni restos unu aŭ

du tagojn en Pekino post la UK, haveblos malmultekostaj vizitoj al la kamparo aŭ granda fabriko.

Loĝigo: La 71a UK okazos en la plej varma kaj pluva periodo en Pekino, kiam la temperaturo facile atingas 30 gradojn celsiusajn. Tial necesas loĝi en klimatizataj hoteloj, kiuj ne kostas malmulte en multmilionara urbo, kiun ĉiutage vizitas pli ol duonmiliono da gastoj. LKK provizore rezervis plurajn centojn da litoj en la hotelo Amikeco, mezklasa, klimatizata, situanta tuj apud la kongresejo. Oni rezervis kelkcenton da litoj en du aliaj hoteloj, el kiuj unu estas luksa. Ne eblas en Ĉinio, kiam temas pri eksterlandaj vizitantoj, paroli pri la prezo de nura hotela tranokto, ĉar estas devige preni tutan turisman pakaĵon, kiu krom lito inkluzivas du manĝojn tage, ĉiujn transportojn, tuttagan ekskurson, du duontagajn ekskursojn kaj ĉiujn enirbiletojn por la vidindaĵoj survoje. En tia aranĝo, unutaga restado en la mezklasa hotelo kostos (en dulita ĉambro) ĉ. 140 guldenojn. En la aliaj du hoteloj, tiu restado kostos ĉ. 200 gld. (altklasa) aŭ ĉ. 230 gld. (luksa).

Tiel UEA kiel LKK konscias, ke tio estas tamen altaj prezoj, ne pageblaj por parto de la kongresanoj. Post multaj klopodoj, oni nun sukcesis aranĝi ankaŭ malmultekostan loĝadon, disponigotan unuavice al gejunuloj kaj kongresanoj el landoj kun pagaj problemoj. Estos amasloĝejo en mezlernejo, kiu situas je kvaronhora piediro de la kongresejo. Oni loĝos tie en simplaj, kvarlitaj ĉambroj. Por ĉiuj tri etaĝoj de la lernejo servas komunaj necesejoj kaj du grandaj duŝhaloj en la teretaĝo. La komforto do ne estas granda, sed ankaŭ la prezo ne altos: 10 ĝis 15 gld. tage. Ni disponos pri 300 tiaj litoj. En la lernejo verŝajne eblos aranĝi ankaŭ malmultekostan manĝon.

Oni nun faras pliajn klopodojn por loĝeblecoj en ia meza kategorio inter la amasloĝejo kaj hotela aranĝo, sed la ŝancoj sukcesi ne estas grandaj. Plenaj detaloj aperos en la Dua Bulteno.

Vojaĝaranĝoj: Kiel pli frue anoncote, UEA aranĝos tutan aron da flugoj el diversaj partoj de la mondo al la 71a UK. Tiuj flugoj estos kunordigitaj kun la diversaj ekskursoplanoj tra Ĉinio. Ni jam pli frue menciis, ke ekz. el Eŭropo eblos flugi al Pekino kaj reen por la sumo de 2 ĝis 3000 gld. Kunlabore kun Japana Esperanto-Instituto, UEA organizos ankaŭ la vojaĝon de la japanaj kongresanoj. Ni jam delonge traktas ne nur kun la ĉina flugkompanio CAAC, sed ankaŭ kun pluraj aliaj grandaj kaj bonrenomaj kompanioj. Ni nun provas kunordigi la flughoraron kun la planataj ekskursoj, provante lasi kiel eble plej vastan elektelecon. Ankaŭ la mendiloj pri la flugkaravanoj de UEA distribuiĝos kun la Dua Bulteno.

Kotizoj: Ĉiuj kotizoj plialtiĝos la 1an de januaro. Ili estos: Kat. 1 (ne individua membro de UEA) 225 gld.; Kat. 2 (individua membro) 187,50 gld.;

Kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro) 150 gld.; Kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo, individua membro) 112,50 gld.

Informoj por vidhandikapuloj: Vidhandikapaj kongresanoj ricevos, se ili aparte petas, sonkasetajn informojn pri la Kongreso.

Reklamoj kaj salonmendoj: Diversaj esperantistaj instancoj ricevis cirkuleron pri la kondiĉoj reklami en la kongresaj eldonaĵoj kaj mendi salonon aŭ budon dum la UK. Se vi ne ricevis la cirkuleron, sed tamen interesiĝas pri tiuj eblecoj, tuj kontaktu la konstantan adreson. La limdato por anoncoj en la Dua Bulteno estas la 20a de decembro, por tiuj en la Kongresa Libro la 30a de marto kaj por salonmendoj la 1a de marto.

Por orientiĝi en la ĉina lingvo: Laŭ saĝa sugesto de iuj kongresanoj, frazaro de la kongreslanda lingvo aperos jam en la Dua Bulteno, difference de la mal-



Homplena strato en la ĉina mondkomerca havenurbo Ŝanhajo, celo de ekskursoj de la 71a UK.

nova kutimo aldoni ĝin al la Kongresa Libro. Krome, Radio Pekino planas realigi en siaj Esperantaj elsendoj praktikan kurson de la ĉina lingvo. Ĝi estas speciale intencita por la partoprenantoj de la 71a UK kaj startos en januaro.

Statistiko: Ĝis la 21a de novembro estis enskribitaj 1 054 aliĝintoj el 48 landoj. Plej forte reprezentigas Japanio (176 aliĝintoj), FR Germanio (119), Francio (101), Usono (75), Korea Resp. (68), Nederlando (61), Italio (54), Finnlando (40), Britio (38), Jugoslavio (32), Belgio (31), Svedio (25), Danlando kaj Hispanio (po 19), Kanado (18) kaj Bulgario (17). La plej granda delegacio estos kompreneble la ĉinaj kongresanoj, sed ili aliĝas rekte ĉe la LKK, kaj ni nun ne disponas pri tiurilata statistiko.

Naskiĝdoloroj de la nuna Ĉinio

Montara vilaĝo (1974), Chun-Chan Yeh (Ye Junjian/Cicio Mar). El la angla trad. William Auld (1924). Pekino: Cina Esperanto-Eldonejo, 1984. 264p. 22cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento n-ro 21. Prezo: 16,50 gld.

Tralego de ĉi tiu romano donis al mi duoblan impreson: pri realaj homoj en kampara medio, kaj samtempe pri vilaĝo ŝvebanta en spaco kaj tempo, kie mankas loknomoj, datoj kaj titoloj de organizoj, kvazaŭ la fluganta insulo Laputa de Gulliver en la satiro de Jonathan Swift. Laŭ tiu disdubiĝo la akra bildo de vilaĝa vivo kaj la sorto de la personoj kontrastas kun la nebulaj aludoj pri loko: ne Hunan, Ĉangŝa kaj Kantono, sed "la provinco" aŭ gubernio, "la ĉefurbo" kaj "la Urbego"; kaj neniam mencio de Kuomintango (Nacia Popola Partio), Ĉang Kaj-Ŝek (Jiang Jieshi), Mao Zedong aŭ iu alia. Estas aparte nereale, kiam la vilaĝanoj dumparole titolas ekzemple la lokojn ne per iliaj nomoj sed per tiaj pudoraj aludoj. Nu, la "Ordo-konserva brigado" aperas ja en la lastaj ĉapitroj.

Mi tuj aldonas, ke tiuj obtuzaj terminoj neniam malhelpas ĝuadon de la rakonto.

La kovrilfaldo informas, ke "temas pri la komenca etapo de la 1927-a Revolucio en Ĉinio, kiu kondukis finfine al la establiĝo de la nuna popola respubliko". Ambigua indiko. 1927 estis fakte la jaro, en kiu la revolucia movado reakcie deviis sub Ĉang Kaj-Ŝek kaj necesis la Longa Marŝo kaj multa luktado por fine atingi sukceson.

Dume regis konjunkturo de: kampanjo kontraŭ la nordaj militestroj; avidaj grandbienuloj; banditoj kaj malvenkaj soldatoj, kiuj marodis la vilaĝojn, kaj plago de granda seko, kiu detruis la kultivaĵojn kaj alportis preman malsaton. Sed malgraŭ tio la homspirito ŝprucas kaj petolas, floras bonhumoro kaj tristo, kaj la vivo de la popolo iras sian vojon.

La romano estas nostalgia omaĝo al la pasinteco kaj ĝi legiĝas flue, kaj ĉiam katenante la intereson. La aŭtoro, sub pseŭdonimo Cicio Mar, verkis antaŭe libron de noveloj kaj skizoj *Forgesitaj homoj* (1937) pri tiu sama medio, sama epoko, kaj nun li kvazaŭ mobilizas tiun materialon por kontinua, plena rakonto. Tion li verkis nun en la angla lingvo, kaj William Auld havis la taskon traduki ĝin en Esperanton. Kiel li sukcesis?

Mi opinias, kun saĝo kaj trasento tia, kian oni atendas de poeto. Kiel talenta tradukisto li konsciis,

ke oni redonu ne nur la sencon sed ankaŭ la stilon de la originalo. La tono de la verko estas romantika, temas pri rememoroj trans kvindekjara abismo de la tempo. Kiel redoni tion aŭtentike? Kial ne rigardi, kiel sin esprimis la aŭtoro en la pli frua Esperanta verko kaj uzi tion kiel gvidilon por tono kaj stilo de la traduko?

Mi trovas klarajn indikojn, ke ĝuste tion Auld faris. Komparante lian tradukon kun la kolekto *Forgesitaj homoj*, mi konstatis plurtipajn similecon en la esprimrimedoj. En postnoto al la antaŭa libro la aŭtoro konfesis, ke la humoro de la verko estas "sentimentala". La stilmarkoj de tiu sentimentalismo estis ĉefe du. Unue, la tendenco bildigi la okazaĵojn grafike per ofta uzo de -ata. Tio cetere karakterizis la proletan Esperanto-stilon de la 30aj jaroj. La okazaĵoj do prezentiĝas al la okuloj per vivaj bildoj kvazaŭ filmo, ĉiu kun eta daŭro. Kaj la dua trajto, por aliflanke akceli la pason de iu evento, estas apliki al ĝi la prefikson ek-.

Nu, por la unua efekto Auld uzis, ja ne -ata, sed la sufikson -ad, kiu emfazas tute analoge kiel -ata la koncernan agon. Por la dua konvenis la sama rimedo ek-, kaj ĝin la tradukanto profitis, sed en pli modera grado ol la aŭtoro de *Forgesitaj homoj*.

Krome li praktikis ie-tie la longajn kunmetojn de Cicio Mar, ekz. "mizersortulino" kaj "vagatingante"; kaj reuzis la parolturnojn "torenti" (*la amaso entorentis en la ĉambron*) kaj "gargari" en la senco de *balbuti* aŭ *stertori*.

Mi permesas al mi unu gloson. Troviĝas la vorto "hordesukeraĵo" por *barley sugar*. Dube. Ŝajnas, ke la angla vorto devenas de la franca esprimo *sucre perlé*, do ĝusta traduko estus "kanda sukero" aŭ simple "kando".

Entute, *Montara vilaĝo* estas verko ne nur en have sed ankaŭ lingve interesa, kaj mi rekomendas ĝin al la legantaro.

Reto Rossetti (Britio)

Endas elekti la vojon

Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo, div. aŭtoroj. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1985. 145p. 22cm. ISBN 83 7013 012 7. Prezo: 15,00 gld.

La Manifesto de Raŭmo (IJK 1980) provis iniciati diskutadon pri la fundamentaj celoj de la Esperantomovado. Ne ĉie oni rekonis la neceson de tia debato; la ordinara esperantisto ankoraŭ konas nur la "pracelojn", kiel la Manifesto ilin nomis. Sed en Pollando oni jam de pluraj jaroj serĉadas novan formulon de nia esperantista idento, unue kadre de Pola Studenta Esperanto-Komitato, poste en la sino de Pola Esperanto-Asocio. La poloj ankaŭ aranĝis la internacian simpozion, kies referaĵojn ĉi tiu libro kunigas.

Pluraj kontribuoj preferas la terminon "Esperanto-komunumo" al la tradicia "Esperanto-movado". Per tio ili emfazas sian pledon por *kvalito*, kiu farus Esperanton alloga jam antaŭ ia "fina venko", kaj *plurismo*, permesanta liberan elekton de celoj sen centra gvidado. Sed sendube la nocio mem de "strategio" pli nature ligiĝas kun "movado" ol kun "komunumo". Miaopinie, ĝuste la duobla karaktero de Esperantujo, kiu ekzistas kaj kiel movado kaj kiel komunumo, komplikas diskuton pri celoj.

En la kolekto elstaras kelkaj kontribuoj (Révész, Leyk, Silber), inspiritaj de la Internacia Junulara Kongreso en Raŭmo, kvankam ĉiuj kulpas pri komplika, nekristaliĝinta argumentado. Ankaŭ "pracelanoj" rajtis libere elpaŝi. Inter aliaj referaĵoj, iuj meritigas atentan tralegon (Aleksiev), dum aliaj estas sufiĉe naivaj por preskaŭ aspekti parodioj. Unu kontribuo (Duc Goninaz) ĉerpas rekte el la spirito de Tyresö (IJK 1969) kaj ne estas klare "raŭmisma" aŭ "pracelana"; ĝi estas ankaŭ unu el la plej pensinstigaj. Pli

konvenciaj estas la artikoloj de Symoens kaj Marević: ili nur postulas pli efikan informadon, kvazaŭ temus pri pure teknika kaj ne enhava problemo.

La leganto rajtas elekti kun kiuj simpatii. Gravus nur, ke oni almenaŭ konsciis pri la neceso de elekto: ne plu ekzistas nur unu strategia doktrino. La mondaj lingvo-problemoj ne fariĝis sufiĉe akutaj, por ke tia radikala solvo kiel Esperanto povu venki kvazaŭ per si mem. Sed multaj tamen ankoraŭ kredas, ke Esperanto estas solvo preta kaj perfekta, tiel ke necesas nur akceptigi ĝin per racia argumentado. La alternativa strategia konfeso, ke la valoro de Esperanto ne estas io donita kaj fiksita, ĝi devas esti konstante rekreata, por ke Esperanto proponu plejeble multe al la spirita disvolviĝo de la individuo – en la nuno. La Lingvo Internacia devas akiri sian ekzistrajton per siaj propraj meritoj, ne per la malmeritoj de siaj rivaloj, realaj aŭ imagataj. De post Raŭmo, la strategia alternativo estis klare formulita plurfoje. Endas elekti, kaj ne per nura inercio.

Jouko Lindstedt (Finnlando)

Laste aperis...

Civilizacio, J.M. Eça de Queirós (1843-1900). El la portugala trad. E. Padrão. Famalicão: la tradukinto, 1985. 40p. Ilus. Mimeo. 21cm. Kajero 11. Novelo (kun biografio enkonduko de la tradukinto) de la fondinto de la portugala Realisma-Naturisma Skolo. Prezo: 3,00 gld.

Kantoj karmemoraj, komp. Konisi Gaku (1934). Ōsaka: Kansaja Ligo de Eo-Grupoj, 1985. 61p. 26cm. Tridek tri japanaj kaj 20 eksterlandaj kantoj kun muziknotoj. Prezo: 15,00 gld.

Lernu Esperanton kun ni/Biz Esperanto öĝreniyoruz, Joachim Giessner (1914). En la turkan trad. Ali-Haydasr Celebcigil. Herzberg: la verkinto, 1985. 35+18p. Ilus. de S. Leporin. 21cm. Elementa 7-leciona lernolibro por turklingvanoj laŭ gramatika metodo; aparta dudirekta vortlisto. Prezo: 6,00 gld.

Life of Zamenhof, The; His Thought and International Language (1920), Edmond Privat (1889-1962). En la anglan (1931) trad. Ralph Elliott. Tokio: Daigakusyorin, 1984. 6+59p. Ilus. 21cm. Konkizigita versio de la biografio *Vivo de Zamenhof* por japanoj, lernantaj la anglan; kun prilingvaj notoj de Saito Tatō. Prezo: 24,90 gld.

Nekonato: la Zamenhofa homaranismo (1957), André Cau-bal. Laroque Timbaut: Laŭte!, 1985. 15p. Ilus. Mimeo. 21cm. SAT-Broŝurservo. Represo de artikolo el *Sennacieca revuo*. Prezo: 1,50 gld.

Plena analiza gramatiko de Esperanto, (1935), K. Kalocsay (1891-1976) kaj G. Waringhien (1901). Rotterdam: UEA, 1985 (5a, korektita eld.). 598p. 22cm. Bind. Jubilea Kolekto *Jarcento de Esperanto*, n-ro 2. ISBN 92 9017 032 8. La plej detala kaj fidinda priskribo kaj preskribo de la ĝusta uzado de la Internacia Lingvo. La normverko sur sia kampo. Prezo: 48,00 gld.

Skizo por racia teorio de vortigado, F. García Blázquez. Karako: la aŭtoro, 1985. 71p. 21 cm. Provo ellabori novan vortforman teorion de Esperanto pli akcepteblan ol la ĝisnunaj. Prezo: 15,00 gld.

Vortoj kun flugiloj; Citaĵoj el la tuta mondo, komp. Ralph Harry. Kanbero: Aŭstralia Esperanto-Asocio, 1984. 4+64p. Mimeo. 21cm. Kolekto de internacie konataj citaĵoj, ankaŭ el Esperanto, kun tema indekso. Prezo: 9,00 gld.

Diversaĵoj:

Afiŝo "La venko 1945", red. D. Perevalov kaj A. Ŝevĉenko. El la rusa trad. L. Novikova. Moskvo: Novosti, 1985. 105×80cm., duflanka. Fote kaj kolore ilustrita afiŝo por festi la finon de la Dua Mondmilito. Prezo: 2,10 gld.

Baf!, kantas Ĝanfranko, Gido, Marĉela. El div. lingvoj. Pisa: Edistudio, 1985. Muzika kulturo 5. Kaseto stereofona. Dek du kantoj kontraŭ grandaj mitoj, la tedo kaj bombasto; kun tekstlibro (15p. 21cm., ISBN 88 7036 031 2). Prezo: 21,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

● **Britio:** Antaŭ tri jaroj Esperanto-Asocio de Britujo (EAB) iniciatis britan Esperanto-Tagon je dato frue en septembro, por trafi la atenton de la publiko komence de la studjaro. Oni ĉi-jare dissendis du aparte preparitajn afiŝojn al pli ol 300 lokaj reprezentantoj, kiuj kunlabore kun lokaj grupoj muntis ekspoziciojn en bankoj, vendejoj kaj bibliotekoj. EAB krome sendis gazetaran komunikon al ĵurnaloj kaj elsend-stacioj. Laŭ raporto de EAB, el la Tago iĝis "Esperanto-semajno" pro la daŭra publiko. Anstataŭ 50, nun venas 250 informpetoj semajne.

● **Nova "Esperanto-hotelo"** en moderna, bone ekipita konstruaĵo povas akcepti ĝis 16 gastojn por feriado, kursoj ks. disponeblas i.a. biblioteko, trinkbufedo kaj ŝirmita ĝardeno. Ne estas klare, kiu posedas la hotelon (Esperanto-Hotelo, 2 Oxcliffe Road, Heysham, Morecambe, LA3 1PS, Britio), kiu situas en nord-okcidenta Anglio cent metrojn for de la strando, en trankvila kvartalo apud la banurbo Morecambe, ok kilometrojn de Lancaster. Membroj de iu ajn Esperanto-asocio ricevas rabaton.

● **Usono:** La junulara sekcio de Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (Usono)

provas starigi inform-bultenon por la junaj usonaj esperantistoj. La tria numero de *JEN* petas kunlaboron: JEN/ELNA, P.O. Box 1129, El Cerrito, CA 94530, Usono.

● **Ĉinio:** En novembro 1984 Esperanto-Asocio de Anhui kaj Radio Anhui kune fondis Korespondan-Radian Esperanto-Lernejon. Oni raportis, ke eble ĝis dek mil personoj lernas per la radiokurso, elsendata preskaŭ ĉiutage dum 30 minutoj. Ĝi estas la unua tia provinc-nivela Esperanto-kurso en Ĉinio. Por la oficiale registrita Esperanto-Kolegio de Anhui (Anhui Daxue, 100-hao Xinxiang, Hefei-Anhui, Ĉinio) profesie laboras pli ol 20 instruistoj kaj oficistoj, funkciigantaj kvar kursojn, en kiuj 120 lernantoj fake studas Esperanton dum du jaroj. La koresponda kurso de la kolegio servas al ses mil lernantoj.

● **Svedio:** Sub "Loke", en la julia-aŭgusta numero, ni informis pri la juna Esperanto-klubo de Bengtsfors. Tie la lerneja estraro ĵus decidis, ke ekde la lerneja jaro 1986-87 Esperanto estos elektebla fako dum la sepa, oka kaj naŭa lernojaroj. En septembro la gubernia lerneja estraro konfirmis la proponitan kursplanon. Tio signifas, ke Esperanto estos samranga lernobjekto kiel la

franca kaj germana lingvoj. Por ke sufiĉe da gelernantoj elektu la Internacian Lingvon, oni organizos ekspozicion. La loka klubo bonvenigos kontribuantojn kaj salutojn el la tuta mondo: Esperanto-Klubo, Bengtsgården, S-666 00 Bengtsfors, Svedio.

Fake

● **Bultenoj:** La Esperanto-Domo en Århus (Haslevangsvej 30, DK-8210 Århus, Danlando) denove eldonas la periodaĵon *Semajna bulteno*, sub la nova redaktoro Eckhard Bick. Ĝiaj 16 mimeografitaj paĝoj celas servi i.a. kiel rapida komunikilo inter unuopuloj kaj grupoj.

● **Fiŝkaptado:** De la 5a ĝis la 8a de junio 1986 okazos en Ancona, Italio, la 46a Internacia Fiŝindustria Foiro. La foiro ĉiujare gastigas pli ol 150 firmaojn el dudeko da landoj, kiuj ekspozicias pri ĉiuj fakoj de la fiŝindustrio. La organizantoj invitis esperantistojn, kondiĉe ke ili povas prui sian fakan sperton. Aĉetistoj kaj ekspertoj el la Tria Mondo povos vojaĝi al Italio senpage. Pliaj informoj kun broŝuro en la itala kaj pitoreska angla lingvo haveblas de: Ente Autonomo Fiera di Ancona, I-60100 Ancona, Italio. Espereble estas pli da profesiaj fiŝkaptistoj en la Esperantomovado, ol oni supozas.

● **Junularo:** En numero 8, oktobro 1985, de la bulteno *Development Forum*, eldonata i.a. de Sekcio por Ekonomia kaj Socia Informado de UN kaj Universitato de UN, aperis artikolo pri la perkomputila eduk-projekto "Unispace" por Internacia Junulara Jaro, en kiu partoprenas UEA (vd. *Esperanto*, p. 95/1985). La artikolo menciis UEA kiel unu el la tri ĉefaj kunlaborantaj organizaĵoj, kaj la kontakt-adreso de la projekto estas tiu de la oficejo de UEA en Novjorko.

● **Medicinistoj:** De la 8a ĝis la 14a de septembro renkontiĝis en Schwerin (norda Germana DR) 80 diversfakaj medicinistoj el GDR, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hungario, Islando, Pollando, Sovetunio kaj Svislando, por partopreni la jam tradician Internacian Medicinistan Esperanto-Konferencon (IMEK). Ili aŭskultis pli ol 30 fakprelegojn, vizitis sanitariajn entreprenojn kaj ĉeestis kulturan programon. La ĉeftemo



● **Parlamenta agado:** La foto montras parton de la ĉeestantoj en Esperanto-akcepto, kiu okazis en septembro en la sidejo de Eŭropa Parlamento en Bruselo. Meze, en kvadratita robo, staras brita parlamentanino Beata Brookes, kiu invitis la aliajn. Parlamentanoj Pol Marck (Belgio) kaj Ib Christensen (Danlando) surloke decidis aliĝi al Eŭropa Parlamenta Esperanto-Grupo, kiu nun konsistas el 45 membroj. Ĝi estas la kunordiga rondo de anoj de Eŭropa Parlamento, kiuj aktive aŭ pasive simpatias kun la Internacia Lingvo.

de tiu 5a IMEK estis "Sana junularo, tasko, respondeco kaj sindevigo por ĉiuj."

● **Kino:** Nur nun ni ricevis detalojn pri tio, ke en 1985 sukcese prezentigis tra Japanio la 105-minuta kolora desegno-filmo *Ginga-tetudô no yoru* (Nokto de la galaksia fervojo), entreprenita de la ĵurnalo kaj televidstacio Asahi kaj "Nippon Herold Films Group". La originalon verkis Miyazawa Kenzi (1896-1933), kiu mem iam lernis Esperanton. La filmon reĝisoris Sugii Gisaburô. La fantazia rakonto estas ne por infanoj, sed profunde filozofia. La sukceso laŭdire aŭldigis multe al la unika figurigo per katoj kaj al muziko per sonsintezilo. La produktanto deziris, ke la filmo estu sennacia, kiel la originala rakonto, do oni kun helpo de Japana Esperanto-Instituto utiligis Esperanton por ĉiuj surskriboj, morsado ks., kvankam kun kelkaj kapricoj de la desegnistoj. Jam estas planite eksporti la filmon, kiu cetere aĉeteblas kiel vidbendo (eld. Asahi Sinbun). La kovriloj de la haveblaj disko kaj kaseto (eld. Techiku Records) havas skribojn nur en Esperanto. Krome, la duonamatora muzikgrupo "World Standard", kiu kantis Esperante en la filmo, deziras daŭrigi sian kantadon en la lingvo internacia.

● **Poezio:** En Eŭropa Poezio-Festivalo, en Loveno (Belgio) fine de oktobro, okazis pluraj Esperantaj prezentoj. Pastro Gerrit Berveling el Nederlando recenzis *Esperanta antologio* en *Pi*, la organo de Eŭropa Asocio por Stimuli la Poezion, kiu organizis la festivalon. En la Festivala Libro aperis Esperantaj tradukoj de poemoj, kiujn s-ino Nicole Pairoux (Belgio) sukcesplene deklamis kaj kantis dum pli ol duonhoron. Kelkaj poetoj esprimis sian dankemon. Marc Vanden Bempt (Belgio) prizorgis Esperantajn librojn en la librofoiro. La sekretario de la asocio poste esprimis sian kontenton pri la kontribuo de la Internacia Lingvo.

● La litova eldonejo Vaga sciigis, ke ĝi venontjare aperigos en Esperanto poemaron de la litova poeto kaj Leninpremiito E. Mieželaitis. La libro aperos en 4 000 ekzempleroj.

● **Tradukado:** De tri jaroj Eŭropa Komunumo evoluigas en Bruselo la projekton pri la traduk-komputilo Eurotra, kiu kostas pli ol 60 milionojn da guldenoj. Eurotra devus povi traduki samtempe inter naŭ lingvoj. Per la kompu-

tilo oni deziras malpliigi la altan koston de la tradukservo, por kiu Eŭropa Komunumo pasintjare elspezis pli ol miliardon da guldenoj. La nun uzata aŭtomata traduksistemo, Systran, povas traduki ĉirkaŭ 300 000 vortojn sekunde, sed la tradukoj devas esti multekoste korektitaj, kaj multaj tekstoj restas komputile netrakteblaj.

Persone

● **Fantom:** La 16an de septembro en la teknologia altlernejo Polytechnic South Bank en Londono, Ian Fantom publike prezentis sian magistran disertacion pri la perkomputila tradukprojekto Distribuita Lingvo-Tradukado (DLT), kiu uzas modifitan Esperanton kiel interlingvon. Fantom ellaboris por DLT apartan sistemon por analizi plursencajn frazojn. Li poste prelegis pri sia laboraĵo ankaŭ en Universitato de Manĉestro kaj Londona Esperanto-Klubo.

● **Lins:** La 3an de novembro la Dua Programo de la radioservo de FR Germanio en Kolonjo intervjuis d-ron Ulrich Lins pri Esperanto. Lins estas renoma historiisto de la Esperantomovado kaj la kompilanto de *Enciklopedio de Esperanto*. La 20-minuta intervjuo, kun muzikaj interrompoj, okazis malfrue posttagmeze en la regula priklultura revuo "Budengasse". La intervjuisto citis el la nova Esperanta traduko de *Maks kaj Morits* kaj utiligis specime-

nan elsendon de la Esperanto-Redakcio de la pola radio, kiun oni rekte transaŭdigis el Varsovio. Fine de la intervjuo Lins povis menci la plenan adreson de Germana Esperanto-Asocio.

● **Lord:** De post la morto de d-ro Bernard Cavanagh en 1983, la Esperanta lekciisteco "John Buchanan" en Universitato de Liverpool restis vaka. De la 1-a de oktobro ĉi-jare funkcias en tiu posteno s-ro Don Lord, kiu laŭ la reguloj lektas 20-foje jare kaj rajtas aljuĝi al unu sia studento Premion John Buchanan je la valoro de cent britaj pundoj jare. Don Lord, 59-jara, gvidas semajnan kurson de Esperanto en Universitato de Loughborough kaj verkas la artikolserion "Ĉiutaga Esperanto" por *La brita esperantisto*. Profesie li tradukas komercajn kaj jurajn dokumentojn el la franca, germana, portugala, itala kaj hispana kaj estas ano de la brita Instituto de Administra Direktado.

● **Simonnet:** De pluraj semajnoj François Simonnet laboras kiel specialisto pri la franca kaj Esperanto ĉe la nederlanda firmao BSO, kiu preparas la perkomputilan tradukprojekton DLT. Simonnet estis profesia instruisto, kiu laboris i.a. en Vjetnamio. Ankaŭ pasintan aŭguston li estis en la urbo Hochiminh, kie la Esperanto-klubo kaj Junulara Kulturdomo organizis por li renkontiĝon kun i.a. lokaj esperantistoj. Simonnet prelegis dum tri horoj pri la Esperantomovado tra la mondo. Partoprenis ankaŭ centraj komitatanoj de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio.



● **Flugkompanioj:** La ĉina komerca flugkompanio CAAC sendis al la ĉina Esperanto-Kongreso (vd. *Esperanto*, p. 187) 11 laborantojn, kiuj finis 4-monatan kurson en Ŝanhajo. Ĉu iam alia flugkompanio tiel multe investis en Esperanto?

INDEKSO

Revuo *Esperanto*

78a jarkolekto

numeroj 949-960

Addis, W. 80
Administrado 103
Afriko 43, 57, 77, 176
Agrikulturo 177
Ahrenshoop 123
AIMAV 205
Amado, J. 32
Andrén, E. 178
Angolo 43
Anjer, L. 98
Aplikado de Eo 7, 114
Araba lingvo, la 9, 131
Argentino 62
Ariste, P. 38, 72, 199
Auld, W. 15, 78, 151
Aunis, B. 152
Aŭkcio 46, 156
Aŭstralio 62, 75
Aŭstrio 36
Bakker, H. 43
Balkano 4, 62
Banet-Fornalowa, Z. 26
Barcsay, Zs. 66
Baumslag, E. 40
Behncken, O. 40
Belartaj Konkursoj 2, 151, 189
Belgio 17, 23, 57, 62, 96, 198
Benczik, V. 190
Bengalia 23, 41
Bengtsson, I. 25, 178
Benino 43, 57
Berger, R. 44
Bertin, Ch. 152
Bertolini, D. 152
Berveling, G. 30, 73
Bibliografio 15, 34, 55, 73, 93, 125, 135, 173, 193, 214
Bibliotekoj 96
Blanke, D. 69, 123
Blinduloj (LIBE) 65, 77
Bociort, I. 18
Bona Espero 17
Borčić, L. 133
Bork, E. 159
Bormann, T. 47
Botaniko 14
Boulton, M. 155, 162, 172
Braun, August 220
Braun, F.J. 85
Brazilo 37, 62, 67, 75, 119, 138, 164, 176
Britio 36, 62, 75, 176, 198, 215
Brozovsky, J. 185

Bulgario 7, 62, 75, 175
Buller, O. 147, 170
Bulthuis, R. 199
Calado, J. 135
Caldera, C. 40
Cansdale, G. 158, 173
Caragea, F. 159
Carr, T. 151, 189
Carson, C. 199
Caruso, P. 38
Cash, R. 33, 54, 193
CED 27, 114
Censinio 91
Centjara Jubileo 61-66, 81, 107, 201, 203
Chambers, B. 220
Chandler, E.W. 19
Chaves, S. 134
Che Junhi 152
Chicot, E. 125
Chou Io 178
Courtenay, I. 40
Culbert, R. 152
Ĉeĥoslovakio 36, 62, 96
Ĉilio 17
Ĉinio 7, 57, 75, 83, 154, 187, 215
Čolić, S. 56
Dagys, J. 14
Damjanov, V. 97
Danlando 62, 215
Daŝgupto, P. 42
Dazzini, M. 139
Dean, E. 139
Delaire, P. 178
Delcourt, M. 31
Delegita reto 104
Dentokuracado 119
Despiney, B. 195
Diego, F. de 191
Dikshit, U. 41
Diplomoj 205
Disertacioj 58, 96
Diskoj 37, 190
Díaz, A. 19
Dobrzyński R. 17
Dorleijn, W. 159
Downes, W. 172
Dratwer, I. 180
Duc Goninaz, M. 53
Dulingveco 37, 198
Duoblaĵoj 194
Durham, N. 98
Easton, F. 39
Ebura Bordo 57
Eduka Fondaĵo Carson 42, 110
Edukado 109, 205
Edwards, J. 155
Ekologio 17, 24, 77
Eksteraj rilatoj 4, 61, 108, 109, 125, 145, 201-204, 205
Ekzamenoj 42, 156
Eldonado 37, 89, 104, 110, 206
Esperantologio 53, 123, 149
Eŭropa Komunumo 57

Evjenij, B. 152
Faka agado 24, 48, 64, 67, 103, 113, 125, 131, 149, 167, 205
Fantom, Ian 216
Farmacio 199
Fayne, Pokalo 155
Federismo 97
Feist, E. 10
Fenyvesi, E. 31
Ferré, E. 191
Fervojoj 17, 77, 139, 199
Festivaloj 77, 83, 186
Fethke, E. 199
Fettes, C. 157
Fiala, L. 48
Filatelo 64, 199
Financo 11, 81, 104, 115
Finnlando 42, 138
Fiŝkaptado 215
Flugkompanioj 216
Foiroj 77
Fondaĵo Grabowski 3, 110, 152
FR Germanio 17, 36, 45, 57, 58, 76, 85, 96, 119
Francio 57, 62, 85, 96, 185
Frank, H. 38, 199
Fraser, T. 10
Friis, L. 89
Gamboa, A. 80
Gavan, J.S. 19
Gazetaraj servoj 61, 155
Genetiko 37
Geografio 199
Geologio 37
Germana DR 62, 69, 123
Giessner, J. 38
Gilmore, K. 152
Golden, B. 152
Goralski, A. 3
Goto Hitosi 165
Gregor, D.B. 15
Greklando 96
Grigorov, A. 180
Grimme, L. 12
Grohovac, Z. 60
Guillaume, J. 98
Gustafsson, K. 39
Ĝemeliĝoj 139
Haase, M. 13, 32, 133
Haazen, J. 38
Haitio 176
Hajasi Ken 30
Hall-Smith, D. 19
Hammarberg, J. 134
Harrison, H. 86, 155, 162
Haszpra, O. 18, 130
Henrikson, J. 44
Hidrologio 119, 130
Hinda Unio 23, 41
Hispanio 62, 138, 176
Hitrov, D. 7
Hon. Patrona Komitato 103, 155, 162
Honoraj membroj 103, 163

Hungario 83, 119, 177
 IFEF 64, 126, 156
 IKUE 65
 ILEI 65, 149, 152
 Ilustrado 206
 Informadiko 37, 77
 Informado 7, 8, 23, 82, 107, 139, 148, 163, 205, 208, 209
 Instituto Hodler 105
 Instruado 10, 37, 165, 205
 Int. Junulara Jaro 35, 95, 195
 Int. Kongresa Univ. 168
 Int. Patrona Komitato 61, 81
 Interlingua 44
 Interlingvistiko 38, 44, 72, 77, 123, 128
 Intervjuo 43, 69, 86
 Ioanu, Ch. 54
 Irano 96, 159
 Irlando 76, 96, 176, 177
 Isaev, M. 132
 Islando 63
 Italio 63, 138, 176
 Jackson, I. 120
 Japanio 36, 57, 63, 76, 165, 176
 Jarlibro 81, 104
 Jervis, G. 180
 Jiang Hongzhang 31
 Jong, R. de 135
 Jubileoj 26, 83
 Jugoslavio 63, 76
 Jullien, M. 180
 Junularo 35, 56, 77, 82, 153, 184, 196, 215
 Kadrokursoj 148
 Kajjam, Umar 13
 Kalendaro 16, 48, 88, 197
 Karucin, K. 78
 Kawamoto Hiromi 206
 Keyes, K. 32
 Kibernetiko 67, 167
 Kiel aktivi 26
 Kikusima K. 5
 Kirvesniemi, E. 19
 Kiselman, Ch. 172
 Klerigado 177
 Kníchal, O. 139
 Knoedt, L.H. 93, 135
 Kock, E. de 10, 71
 Kolarov, V. 200
 Kolb, T. 196
 Kolker, B. 120
 Komputado 97, 101, 205, 208
 Konf. Sekureco kaj Kunlaboro 146
 Kongo 36, 43, 176, 177

Kongresoj:

UK 69a, Vankuvero 106
 UK 70a, Aŭgsburgo 28, 45, 70, 90, 141, 169
 UK 71a, Pekino 211
 UK 71a, Pekino 81, 102, 187
 IJK 40a, Swanwick 107
 IJK 41a, Eringerfeld 45, 157
 IJK 42a, Neurim 175

IJK 43a, Krakovo 137
 Infankongreseto 107, 156
 Kooperativoj 35, 56, 58, 97, 184
 Korea Resp. 57, 63, 96
 Korespondado 59
 Kos, K. 80
 Kotiztabelo 179
 Koutny, I. 172
 Kovács, L. 91
 Kökény, L. 128
 Kraus, L. 39
 Kubo 57, 75
 Laborplanoj 103
 Landa agado 67, 112, 185
 Lapenna, E. 10
 Larglantier, G. 69
 Le Puil, J. 54
 Ledon, G. 134
 Leon-Smith, G. 209
 Leppäkoski, J. 60
 Lernejoj 163
 Lerniloj 10, 66, 77, 199
 Levin, R. 31
 Légori, G. 40
 Li Hajpin 155, 163
 Li Yuping 97
 Liberman, E.J. 53

Libroj:

Aforismoj 14
Ajn/kaj aliaj poemoj 134
Biblia vortaro 171
Bukedo/hungara poezio 190
Centa simio, La 32
El Anatol 12
Elprovado de l' amo 133
Eŭlalia 54
Facetoj 135
Fonto 152
Istoriĵa/interlingvistiki 72
Kaj la ceter' - nur lit. 52
Kio estas Esperanto? 134
Komunling. nomoj de plantoj 14
Krado-mondo 191
40 vidindaj lokoj en Ĉinio 91
Lingvo kaj komunikado 192
Logika bazo de vortfarado 53
Lokis 31
Matematiko, instru. 172
Mezepoka periodo, La 92
1887 kaj la sekvo... 52

Mi malamas... 30
Molekuloj 91
Montara vilaĝo 213
Monto, La 73
Morta suito, La 33
Morto... Kinkas Akvobleko 32
Ne nur leteroj... 172
Nobela burĝo, La 31
Nomaro de britaj birdoj 192
Ombro sur interna pejzaĝo 133
Pensoj kaj protestoj 135
Prezo de la elaĉetado, La 15
Revenas mi 54
Robaioj, La 13
Saluton al la suno 71
Satana anĝelo 134
Scienca interling. simpozio 11
Seks-edukado k. psikoterapio 52
Strategiaj dem.. Eo-komunumo 213
Sur kampo granita 30
Uĉebnik jazyka esperanto 132
Vivo de S. Körösi Csoma 31

Libromerkato 24
 Libroservo de UEA 104, 155
 Lindblom, A. 184
 Lindstedt, Jouko 214
 Lingvistiko 17, 37, 69, 97, 128, 138, 208
 Lins, U. 18, 33, 120, 216
 Linton, K. 140
 Lippmann, W. 199
 Literaturo 17, 38
 Lloancy, R. 53, 152
 Long, Kris 134
 Lord, Donald 216
 Lorjak 54
 Ludovikito 152
 M'Bow, A.M. 5, 125, 145, 178
 MacGill, S. 6, 84, 152
 Maeda Yonemi 152
 Maertens, G. 1, 146
 Maier, I. 133
 Maiten, H. 169
 Makaŝvili, Z.A. 14
 Malto 63, 76
 Marson, P. 159
 Mayer, H. 178
 Márkus, G. 167
 Meakin, C. 98
 Mecenatoj 42
 Medicino 97, 215

Bindilo aŭ Jarkolekto

Ni indeksis por vi la jarkolekton, sed tio ne diros al vi, kie troviĝas la bezonata revunumero. Ne eblas lasi unuopajn revunumerojn treniĝi tra la bretoj, tirkestoj, ĉambroj kaj jaroj. Jen du ideoj por solvi la problemon radikale:

Bele bindita jarkolekto kostas nun 36,00 (por Nederlando 37,80) gld., plus afranko. Atentu! Ni bindas nur tridek jarkolektojn, kaj la plimulto estas jam antaŭmendita.

Bela bindilo el kvazaŭleda plasto, por teni en perfekta ordo la numerojn de la aktuala jaro. Prezo 9,00 (por Nederlando 10,71) gld., plus afranko. Triona rabato ekde 3 ekz.


Meier, G.F. 69
 Melasniemi, H. 26
 Membrostatistiko 39, 104
 Menga, E. ar 15
 Mérimée, P. 31
 Milojević, S. 201
 Minnaja, C. 80
 Miyamoto Masao 33, 97, 178
 Molière 31
 Monumentoj 124
 Muller, R. 183
 Munniksma, F. 135
 Muzeoj 59
 Naber-Keller, J. 32
 Nagey, J. 159
 Naturscienco 120

Esperanto 105, 181
 Esperanto-dokumentoj 105
 Kontakto 106
 Lang. Problems &... Planning 208
 Perrenoud-Theis, W. 60
 Persson, M. 130
 Pilger, W.F. 14
 Pirlot, G. 22, 131
 Piron, Claude 211
 Plehn, H. 80
 Poezio 8, 59, 77, 120, 139, 189, 216
 Pollando 36, 64, 119, 128, 198
 Pontika, M. 4
 Poŝtmarkoj 61
 Premio Zamenhof 183
 Psikologio 53, 82, 209

Sadler, V. 14, 101
 Saletti, N. 153
 San-Franciska Ŝtata Univ. 165
 San-Marino 177, 205
 SAT 164
 Saussure, R. de 53
 Schmidt, G. 200
 Schnitzler, A. 12
 Schubert, K. 12, 54, 72, 101, 129, 149
 Sciencfikcio 86
 Sekelj, T. 132, 204
 Semajno de Int. Amikeco 2
 Semenova, Z. 132
 Seppik, H. 38
 Setälä, V. 98, 121
 Shanker, I. 60

iam kompletigota plena verkaro de I.I. zamenhof

Kio pli trafa ol ekkompletigi sian kolekton de tiu ĉi monumenta serio okaze de la Tago de la Esperanto-Libro (la 15an de decembro)? La unua volumo de la originalaĵoj (*unuaj libroj por esperantistoj*) ne plu haveblas aparte sed nur en kompleto kun: ■ *la inkunabloj de esperanto* ■ *ni laboru kaj esperu!* ■ *antaŭen al la laboro!* ■



eldonejo ludovikito

tamen la afero progresas! ■ *hebreo el la geto* ■ *kun gradaj paŝoj eksterlanden!* ■ *klopodis organizi, sed vane!* ■ *por kaj kontraŭ reformoj!* ■ *mortinta, sed senmorta!* ■ La kompleto kostas 390,00 gld, unuopaj volumoj po 39,00 gld. Aperis du pliaj volumoj de originalaĵoj: ■ *la neforgeseblaj kongresoj* ■ *poŝtrikolto de ludovikaĵoj* ■ kaj tradukvolumo: ■ *de patronia al ŝekspir* ■ (ĉiuj po 48,00 gld.) kaj du kromkajeroj: ■ *senlegenda biografio de I.I. zamenhof* ■ *korespondaĵo ludovikologia* ■ (po 33,00 gld.). Ĉio ĉe: uea, jei, kleg.

Nederlando 57, 76, 163
 Nemere, I. 2, 38, 73, 152
 Nervi, M. 72, 134
 Nijveld, W. 91
 Nitobe Inazo 18
 Nordenstorm, L.G. 134
 Norvegio 36, 63, 76, 138
 Nourmont, C. 28
 Nov-Zelando 64
 Nyilasi, J. 91
 Ochoa, J. 180
 Ockey, E. 191, 192
 Oficiala informilo 18, 38, 59, 78, 98, 140, 178, 200, 220
 Oosugi Sakae 33
 Ornitologio 192
 Papazov, D. 4
 Pariza Festivalo 5
 Parlamenta agado 17, 25, 38, 67, 178, 215
 Paruzel, H. 171
 Pastizzi-Ferenčić, D. 183
 Pádua, G. 32

Periodaĵoj:

Aktuala komputiko 205
El popola Ĉinio 83

Pupteatro 59, 168
 Quesada, M. 152
 Radio 7, 17, 20, 60, 68, 97, 100, 119, 197
 Radio-amatoroj 65
 Ragnarsson, B. 2
 Rapley, J. 11, 105, 192
 Rautio, Y. 19
 Reagoj 10, 44, 66, 129, 170
 Rees, M.v. 140
 Regiona agado 4, 113
 Remado 199
 Resulović, M. 4
 Régulo, Juan 76, 206
 Rinke, H. 60
 Ritterspach, G. 127
 Rizzo, P. 180
 Rodenhuis, W. 200
 Rodrigues, A. 80
 Roff, D. 158
 Rokicki, R. 11
 Rosbach, J.H. 59, 120
 Rossetti, Reto 191, 213
 Rougetet, G. 180
 Röllinger, H. 78, 124
 Ruando 57
 Ruĝa Kruco 177
 Rustaveli, Sòta 14
 Sabelli, W. 140

Sibayama Zyun'iti 205
 Simonnet, F. 216
 Sinoda Hideo 65
 Skaftfell, B. 98
 Socilingvistiko 27, 122, 208
 Sociologio 82
 Solar, A. 99
 Sovetunio 58, 76, 96, 119, 177
 Srilanko 36, 97
 Starr, M. 99, 127
 Sturzenegger, J. 220
 Sudafriko 8, 198
 Sutton, G. 6, 22, 83, 86, 182
 Svedio 25, 43, 64, 76, 119, 138, 215
 Svislando 64, 119
 Symoens, E. 148
 Szábo, K. 84
 Szilágy, F. 31
 Ŝako 48, 138
 Ŝercoj 178
 Ŝegota, N. 60
 Ŝimunić, A. 133
 Ŝtimec, S. 133, 168
 Tanaka Miyosi 152
 Teatro 5, 77, 83, 154, 186
 Teixeira, F. 32
 TEJO 35, 56, 81, 95, 111, 137, 158, 175, 184, 195, 196

Telekomunikado 208
 Televido 7, 17, 23
 Tendumado 78
 Terwisga, P. van 66
 Terziev, D. 71
 Texier, J.-L. 186
 Thatcher, M. 78
 Thomas, E. 40
 Todorov, P. 126, 175, 182
 Tomić, A. 99, 140
 Tonkin, H. 162
 Tófalvi, E. 139
 Tradukado 96, 101, 216
 Tranque, C. 19
 Triolle, R. 199
 Tsirimokos, A. 159
 Turismo 17, 62, 125, 182
 Tvarožek, E. 92
 UEA:
 Estraro 21, 81, 103, 145
 Komitato 81, 103, 145, 162
 Umeda Yosimi 82, 120
 Unesko 4, 61, 109, 125, 145, 201-204
 Unispace 95
 Universitatoj 18, 22, 59, 205
 Unuiĝintaj Nacioj 108, 161, 183

Usono 57, 64, 165, 215
 Varsovia E-ista Societo 26
 Vedin, H. 43
 Venezuelo 64, 96, 198
 Verkistoj 131
 Verloren v. Themaat, W. 44, 170
 Veteranoj 59, 65
 Virina agado 183
 Virta, E. 200
 Vjetnamio 76
 Vortaroj 78
 Wandel, A. 95
 Wang Fulong 187
 Waringhien, G. 13, 18, 52, 92
 Wijngaarden, S.v. 139, 177
 Witkam, T. 102
 Witscher, D. 32
 Wojtakowski, E. 171
 Wolff, G. 180
 Xu Xiaoya 31
 Ye Junjian (Yeh) 188, 213
 Zairio 77
 Zamenhof, L.L. 206
 Zamenhof, Lidia 139
 Zhang Qicheng 154
 Ziegler, G. 80

UEA en Wahiawa kaj aktivis en radioamatoraj rondoj. En 1973 aperis lia *Radioamatora Esperanto-terminaro por radiofonio*; *ĵargona-Esperanta kaj Morso por esperantistaj radioamatoroj*.

JOHANNES J. STURZENEGGER (1927-1985) forpasis antaŭ nelonge en Zuriko, Svislando. Li siatempe estis administranto de la svisa Serva Centro de UEA kaj komitatano. En 1965 aperis *Unesteno*; *Universala Esperanta stenografio*, de kiu li estas kunaŭtoro. Li estis dumviva membro de UEA.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (*unu internacian respondkuponon*). *Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Kontraŭ memorigaj poŝtmarkoj, Filatela Kooperativo, Castro Barros 1433, RA-1237 Buenos Aires, Argentino, sendas Esperantajn librojn, revuojn, poŝtmarkojn kaj bildkartojn.

Korespondi tutmonde deziras sinjoro Khosrow Mahdjubian, P.O. Box 44715-1156, Langerud-Gilan, Irano.

23-jara pentristo deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn kun Nederlando, Britio, Danlando kaj FR Germanio. S-ro Nikolaj Vološin, ul. Lvovskaja 63/kv.81, Volinskaja obl., SU-263018 Luck, Sovetunio.

Deziras interŝanĝi tutmonde bildojn pri popoldancado, folkloro kaj tradiciaj vestaĵoj s-ino Che Junhui (Hortensio), Yeogchon-dong 32-37, Eunpyeong-gu, Seoul-122, Korea Respubliko.

El Turkio deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn s-ro Mehmet Telyakar, Aydınlık Sokak 23, Ortaköy, İstanbul, Turkio.

Hola gesamideanoj! Se por vi Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo kaj „nova sento”, tiam skribu al: Homarana Asocio, Bismarckstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Ni havas ion interesan por vi!

Oficiala Informilo

ĈEFDELEGITO EN KANADO

La ĉefdelegito de UEA en Kanado havas novan adreson: S-ino Merle Haltrecht-Matte, 122 Seaton Street, Toronto, Ont. M5A 2T3.

SOCIETO ZAMENHOF 1985

Nederlando: W. Spaander. Usono: Alberta Casey.

DONACOJ 1985 (Gld.)

ĝis la 12a de novembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Germain Pirlot 30,50. Finnlando: Tapio Sormunen 52,00. Japanio: anonime 200,00. Anonima donaco 15 000,00. Sumo ĉi-jara 26 949,25.

ĜENERALA KASO: Usono: M. Dougherty 58,65. Sumo ĉi-jara 8 677,92.

ASOCIA KAPITALO: Heredaĵo Engelŝer 2 092,50. Sumo ĉi-jara 2 299,85.

PROPAGANDA KONTO: Usono: M. Dougherty 150,00. Sumo ĉi-jara 212,38.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$ 100): Usono: Joan Gildemeister. AMIKOJ (minimumo \$ 10): Britio: M. Clarke;

Mary Najbaro. Finnlando: Aappo Kurikka.

PATRONOJ DE TEJO 1985

Britio: J.M. Ibbotson; Patricia Sinclair. FR Germanio: Claudia Hamelbeck. Francio: René-Jean Marmou. Luksemburgo: Brian Moon. Nederlando: B. Kappert.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Nekrologoj

AUGUST BRAUN (1915-1985) el Svislando mortis la 19an de septembro. Li prezidis Kulturan Centron Esperantistan (KCE) en La Chaux-de-Fonds ekde ties fondiĝo en 1968 ĝis la pasinta jaro, kiam li fariĝis ĝia vicprezidanto. Li prizorgis aparte la eldonadon de KCE. Li estis la delegito en Hauterive kaj dumviva membro de UEA.

BUNNIE J. CHAMBERS (1906-1985) mortis la 15an de oktobro en Honolulu, Usono. Li lernis Esperanton en 1921. Dum multaj jaroj li estis la delegito de

Respondoj al la eta kvizo pri

kontakto

1. La nombro de pagintaj ricevantoj por *Kontakto* meze de oktobro 1985 estis 1 804.

2. Kompare kun la nombro antaŭ tri jaroj, tio estas pli ol la duoblo (estis tiam nur 865).

3. 70% de la individua membraro de UEA loĝas en Eŭropo. Nur 54% de la pagintoj por *Kontakto* loĝas tie. Post Eŭropo, la kontinento kun la plej granda procento estas Afriko! Vidu:

	Pagintoj por <i>Kontakto</i> , okt. 1985		Individuaj membroj de UEA 1984	
Eŭropo:	976	54%	4 372	70%
Afriko:	317	18%	68	1%
Azio:	240	13%	687	11%
Ameriko:	215	12%	948	15%
Oceanio:	56	3%	181	3%

4. El la proponitaj temoj nur *Akvo* ne ĉefrolas en 1986; tio estas la temo de numero 85/6. La temoj por 1986 estas do:

86/1 Ĥ **86/2 Ĉinio**

86/3 Revivigo de lingvoj kaj de etnaj kulturoj

86/4 Morto **86/5** Arto kaj literaturo.

5. La jubileo, kiu plej frue alvenos, estas la apero de la centa numero de *Kontakto* (1986/6). La Centjara Jubileo de Esperanto okazos en 1987, dum la centjariĝo de la plej juna redaktoro de *Kontakto*, laŭ la nunaj prognozoj, ne okazos antaŭ 1990.

Kunfestu kun ni nian jubileon en 1986. Iĝu Patrono de TEJO aŭ abonu la gazeton por ricevi leg-plezuron 6-foje en la jaro. Anonciĝu hodiaŭ ĉe via enlanda kotizperanto.

Kulmino de la roman-arto de Sudameriko

DOÑA BÁRBARA

de **Rómulo Gallegos** (1884-1969),
majstra priskribinto de la sudamerika
pejzaĝo, en 1947 ŝtatestro de Venezuelo.

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de
nia arta prozo..."

Juan Régulo Pérez

"Granda kvalito de la verko estas la perfekteco
de la lingvo. ... rara juvelo, ..."

Gaston Waringhien

"La traduko impresas mirinde klara kaj pose-
das la netan rigoron de la kabea stilo en *La
faraono*."

Henri Vatré

El la hispana trad. F. de Diego. Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo: **nur 16,20 gld.** (UEA estas la ĉefdistribuanto, do vi ricevos de la Libroservo de UEA **rabaton de unu triono** por mendo de minimume tri ekzempleroj) plus sendokostoj.

KSM

Se vi serĉas seriozajn korespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejoj), turnu vin al la

Koresponda Servo Mondskala de UEA

Adreso: KSM, p/a s-ro R. Llorens,

121 bis, Bd. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

Koncepto de kosma evoluo

Nia mondo estas parto de la kosma evoluo. La homoj devas partopreni en profunda meditado por disvastigi spiritan harmonion. Ni devas konservi ĉiujn religiajn instruojn, kiuj celas al harmonio inter la popoloj. Se ni pensas kosme, niaj ĉimondaj problemoj malpliĝas, kaj estos perspektivo por vera paco. Mi ankaŭ opinias, ke ni bezonas pli bonajn viglajn familiajn vivojn en nia socio. Deziras trovi homojn kun similaj ideoj por korespondado s-ro John Kailenta, 83 Kemball Ave., Staten Island, NY 10314, Usono.

URĜA ALVOKO: La sola espero rilate la solvon de la mondvastaj problemoj estas la reveno al la bibliaj instruoj. Por ricevi senpagan libreton kun fascinaj detaloj, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH 17 7LN** aŭ, se ekster Eŭropo al: **P.O. Box 373, Baronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

La nun jama fama legolibro por progresantoj, speciale komisiita de UEA, kun 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

"Ĉi tiu riĉ-enhava kaj lingve bonega libro estas skribita en stilo, kiun oni sen pli povas nomi modela. Kvankam la aŭtorino klopodas por ke la libro estu gradigita de tre facila al malpli simpla, ni nenie trovas stilon infanan, nematuran kaj tedan, kiel ofte en lerniloj. Ĉi tie ni renkontas Esperanton en ĝia pura formo, klara senartifika kaj ofte tre originala."

H.A. de Hoog (*Dia regno*, n-ro 1/1985)


Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

NUDPIEDA GEN

La fama kontraŭmilita bildstria romano en mirinde flua esperanta traduko kaj bonega teknika prizorgo.

Nudpieda Gen (1973), Keizi Nakazawa (1929). Eljapanigis Yukio Izumi. Tokio: Rondo Gen, 1985 (2a eld. reviziita). 4 + 284p. Bildstria romano. 21cm. Prezo: 30,00 gld., plus sendokostoj. Mendebla ĉe: UEA, JEI, KLEG.

Premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA kiel "Infanlibro de la Jaro 1982"



SENNACIULO

Ĉu vi konas ĝin?
Monata organo de SAT

– *Laborista esperantismo – Kontraŭ rasismo*
– *Kontraŭ faŝismo – Por la homaj rajtoj – Eĥo de sociaj luktoj – Donas la parolon al ĉiuj laboristaj tendencoj...*

Proveksemplero kun abontarifo havebla kontraŭ internacia respondkupono ĉe:
SAT, 67 Av. Gambetta, F-75020 Paris

Ĉu vi konas la teron?


Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj

Altnivela enkonduko en la geologion, originale verkita de d-ro Endre Dudich. Li traktas en populariga maniero ĉiujn subbranĉojn de la geologio.

Ĉiun ĉapitron vivigas kaj klarigas abundaj figuroj kaj tabeloj.

"... tiuj, kiuj havas bazan konon de la natursciencoj, certe profitos multon el la libro. ... mi profunde rekomendas ĝin al tiuj, kiuj interesiĝas pri la baza terscienco kaj ĝia aplikado." J.M. Mabesoone.

Eld. Scienca Eldona Centro de UEA, 1983. 150p. (+68p. da anoncoj). 23cm. ISBN 963 571 080 1. Prezo: 12,00 gld. (plus sendokostoj.) Rabato de unu triono ĉe samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj.



**KULTURA
ESPERANTO
DOMO
Grésillon
F-49150 BAUGÉ**

La "Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj" estas kooperativa societo fondita en 1951. Ĝi posedas la bienon "Grésillon" kun kastelo kaj 17-hektara parko. Ĉiujare ĝi organizas:

- kursojn diversgradajn,
- prelegojn diverstemajn,
- distraĵojn diversspeciajn,
- ekskursojn en belega regiono.

KULTURAJ ARANĜOJ 1986

29/3 - 2/4: **Pedagogia Seminario**
30/3 - 5/4: **Internacia Renkontiĝo de Infanoj**
15/6 - 29/6: **Internacia Renkontiĝo**
29/6 - 20/7: **Prelegoj kaj kursoj**
21/7 - 10/8: **Kursoj**
10/8 - 23/8: **Informatiko per Esperanto**
17/8 - 31/8: **Renkontiĝo de blindaj esperantistoj**

Petu informojn: Esperanto-Domo Grésillon, F-49150 Baugé, Francio.



Esperanto und Wissenschaft Zur Plansprachenproblematik de Detlev Blanke

Elstara informilo por lingvosciencistoj. Informriĉa germanlingva skizo, kiu science traktas planlingvojn, interlingvistikon, la planlingvon Esperanto, kun bibliografioj de sciencaj verkoj.

Eld. Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Berlino, 1982 (represo). 88p. 21cm. Prezo: 12,00 gld. de la sola distribuanto Libroservo de UEA (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).